



- Amatora  
Poezio -

Originale  
Esperante  
Verkita

563

1934

de Julio Mangada Rosenörn. (Hispanio)

Madrid.

J 1934

## VERKARO

*Liverota de Hispana Esperanto-Asocio (Apartado de Correos 1089, Madrid), preskaŭ preskoste al la samideanaro:*

**TERMINOLOGIO DE LA ARKITEKTURO**, de Francisco Azorín, 20×14 cm., 210 paĝa en luksa papero kaj pli ol 2.000 bildoj ilustrantaj la terminaron. Prezo: 8 sv. fr.

**MIA POEZIO (POEMARO)**, de Rafael de San Millán. 17 1/2×12 1/2 cm., 62 paĝa. Prezo: 0,60 el sv. fr.

**LA KREITAJ PROFITOJ**, komedio originale hispane verkita de Jacinto Benavente, tradukita de Vicente Inglada. 17 1/2×12 1/2 cm., 96 paĝa. Prezo: 0,75 sv. fr.

**LA GENIA KAVALIRO DON KIŬOTO DE LA MANCA** (Rimarkoj pri la titolo de la verko, dediĉo, antaŭparolo, versaĵoj al la libro, k. c., kaj unua ĉapitro de la fama verko), de Cervantes, tradukita de Julio Mangada Rosenörn. 16 1/2×12 cm., 31 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,45 sv. fr.

**AVILA**, de Julio Mangada Rosenörn, historia-arta priskribo, biografioj de Sankta Tereso, la tutmondjama verkistino, kaj de Alonso de Madrigal nomata Oceano de la Sciencoj (komenco de la XV jarcento), k. c., kun 30 belaj bildoj, luksa papero, 16 1/2×12 cm., 62 paĝa. Prezo: 0,75 el sv. fr.

**FERDINANDO VI KAJ FARINELLI**, de Julio Mangada Rosenörn. Historia noveleto originale verkita proze kaj verse, 19×14 cm., 32 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,60 el sv. fr.

**PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ. POPOLKANTARO DE MURCIA**, de Julio Mangada Rosenörn, ilustrita eĉ kun multenombraj muzikaĵoj, 19×14 cm., 51 paĝa luksa papero. Prezo: 0,75 el sv. fr.

**EL MODERNA HISPANA PARNASO**, enhavanta poemojn tradukitajn de Julio Mangada Rosenörn, kun belegaj ilustritaĵoj (20 bildoj), 19×14 cm., 32 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,75 el sv. fr.

**DU JUNAJ FRAŬLINOJ KAJ KORNELIINO**, du novelaj el bonekzemplaj noveloj de Cervantes, tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn, 19×14 cm., 70 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,75 el sv. fr.

**¿QUE ES EL ESPERANTO?**, verkita kaj aranĝita de Julio Mangada Rosenörn, entenante hispanlingve opiniaron pri esperanto de tutmondjamaĵ eminentuloj, koncizan gramatikon, nur esperantan ekzercaron el tiu de la Majstro kaj sufiĉe kompletan esperant-hispanan vortaron; tial la kajero 14×10 cm. kaj 32 paĝa estas vere kompleta lernolibro por hispanlingvanoj. Prezo: 0,15 el sv. fr.

# Amelia kaj Marina

AMATORA POEZIO


ORIGINALE ESPERANTE VERKITA

DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

1934

PRESEJO :  
CHULILLA KAJ ANGEL  
STRATO TORRECILLA DEL LEAL, 17  
MADRID





—o— ANTAŬDIROJ —o—

Jen frukto de mia poeziemo, per kiu mi ne pretendas prezenti min antaŭ la Esperantistaro kiel poeton; sed jes, prezenti la efikon de nia kara helpa lingvo internacia, rimarkigante unu fojon pli ĝian altvaloron.

Mi volas atentigi la esperantajn poetojn pri du metrikaj formoj de la hispana poezio, pri la Romanco kaj pri la Segidiljo: la ROMANCO estas tiel facila, gracia, natura, fluanta kaj alkonformigata al la karaktero de la kastila lingvo, ke ĝi ŝajnas elstariĝi de la prozo mem, kaj estas prozoj kiuj aŭdiĝas verse, romance. Ĝi estas pli-malpli longa serio da versoj oksilabaj, el kiuj la ĉaraj ripetas la saman asonancon, aŭ neperfektan rimon, kiu koncernas nur la vokalojn, kaj kiu komenciĝas je la lasta silabo akcentita en ĉiu verso; la malĉaraj ne havas rimon. Kvankam ĝenerale la versoj de la romanco estas oksilabaj, kiam la versoj havas malpli da silaboj, oni nomas ĝin mallonga; kaj kiam la versoj estas dekunusilabaj, oni nomas ĝin heroa. La tipa romanco estas oksilaba.

La popolo naskis la romancon, kaj ĉi tiun oni verkis por la popolo mem, kaj estis la Juglares (fluglaroj-mezepokaj kantistoj) kiuj tra stratoj kaj placoj kantadis por amuzi la popolon. Ĝi estis la plej plebeja formo de la poezio kaj la unua paŝo de la hispana poezio lirika, kaj ĝi entenas la plej riĉan kaj abundan materialon de la hispana epeo. Per la romanco, la tutmondfama Lope de Vega naskis kaj vivigadis la nacian popularan teatron. La romanco esprimis fidele la sentojn, emojn, tradiciojn, gloriojn, k. c., de la popolo kaj de ĝiaj herooj; per ĝi oni trafas eksterordinare la simplan, belan, fluan, sentigan, herooan formon rakontantan la pensojn kaj sentojn, ĝi estas altvalorega trezoro de la hispana Literaturo.


Kiam «Hispana Esperantisto» aperigis mian roman-

con «Kiam mi rajdas», mi ricevis kuraĝigantajn gratulojn, speciale de apostolo de Esperanto en Andaluzio, klera esperantisto kaj arkitekto, S-ro. Trinidad Soriano; kaj ĉi tio, ĉar Esperanto estas «simpla, fleksebla, belsona», kaj tial ke ĝi devas prezenti ĉiajn formojn de la literatura vidpunkto, kuraĝigas min por konsili, ke oni atentu kaj verku la ROMANCON.

La Segidiljo ankaŭ estas gracia, natura kaj fluanfa strofo el sep versoj, el kiuj la unua, tria kaj sesa estas sepsilabaj, kaj dua, kvara, kvina kaj sepa estas kvin-silabaj; ĝenerale kun malkompleta rimo la dua kaj kvara, kvina kaj sepa, sed la asonanco de ĉi tiuj lastaj estas malsama je tiu de la antaŭaj. Ankaŭ la segidiljo povas havi nur la kvar unuajn versojn. Multenombraj kantoj de Murcio, Andaluzio kaj Manĉujo utiligas la segidiljon. Ĉi tiu same, kiel la romano devenas de tre malnova epoko, araba estas ilia origino, ĉar la araba poezio estas vere riĉa fruktodona fonto influanta eĉ italan, francan kaj anglan poezion.

Kvankam mi prezentas min aŭtoro  
de ĉi poemaro, la publiko  
juĝu min nur esti amatoro  
ĉe la kampo de l' beletristiko.

Per la poemaro, mi nur celas  
kiel sonas nia lingv' agrable,  
kiel plene Esperanto belas  
por esprimi ĉion tre kapable.



## KVAZAŬ PROLOGO

Eble estas ne tre bona diskreto  
ja rekomendata de la singardo,  
ke ĉi tie, en la libr' avangardo,  
jam aperu de la kvazaŭ poeto  
la fizika bildo, lia portreto,  
antaŭ ol animo klara de l' bardo ;  
sed de tiu ĉi la granda korardo  
turnas sin al la leganto per peto :  
vi rimarku min jam tre maturaĝa ;  
vi, do, senkulpigu mian pretendon  
se ĝi estus vere tute malsaĝa,  
ĝin ne juĝu same kiel ofendon  
al la poezi' de homo kuraĝa  
kaj senhonta ; aŭdu mi ne la plendon,  
ĉar per tiu ĉi la libro mi celas  
montri kiel ESPERANTO belsonas,  
kiel la neŭtrala lingvo rimbelas,  
kiel lingv' internacia proponas  
riĉan versfaradon, kiu tre helas,  
ĉar abundajn formojn ĉiajn ĝi donas.

## K L A R I G O J

Pro la morto de filinoj tre karaj  
rememori ilin estas mia la kulto ;  
la titol' de l' libro estas ĝia rezulto,  
la klarigojn vi konscios, do, klaraj.

## P R I T I T O L O J

Historio, ĉu novelo ?  
La novel', ĉu historio ?  
Tradicio, ĉu fabelo ?  
La fabel', ĉu ver' pri io ?



Unu kaj aliaj havas  
ion el la ver' ĉe l' teksto ;  
la titolo, do, ne gravas,  
ĉar ĝi estas nur preteksto.

### **A V E R T O**

Miajn gelegantojn karajn  
atentigi mi deziras :  
bonatentu rimojn klarajn,  
kiujn ĉiam mi jam tiras

por la versoj de l' poemoj.  
La sufiksoj, participoi,  
estas preskaŭ por la temoj  
ne skribitaj sur la slipoj.

Kvankam amator' humila,  
volis mi por versesprimo  
deflankiĝi de facila  
participsufiksa rimo.

## DEDICO

Al mia tre kara fil' Ludoviko,  
al lia kuraĝ' por cel' civitana  
per lia kultur' kaj volo tre sana  
de koro tre pura eĉ kun mistiko.

Ĉar estas fervora, li, bolŝeviko,  
laboras senlace—ago ne vana,  
eĉ kvankam aljuĝu l' agon satana—  
por certa triumf' de ĉi politiko.

Li sentas profunde ĝojon intiman,  
ĉar homo ja trafos la ekvilibron  
socian, moralan, justan, animan ;

la Mondo intense sentas korvibron  
atingi triumfon ravan, proksiman.  
Al li mi dediĉas tiun ĉi libron ;

al li tre bonkora, saĝa, talenta  
triono restanta el triunuo  
tre kara kaj mia, tre diligenta

al ĉia l' ofero, tamen sen bruo,  
la libron dediĉas ; ke li kontenta  
sin sentu pro sia kora la skuo.



Mia filo Ludoviko

## PRI MIA PLORATA FILINO AMELIO

### I

Mia kara filino AMELIO  
estis mia tre justa la fiero :  
estis ja rimarkinda ŝia scio  
ĉar ŝi tute dediĉis sin al klero ;  
instruadi, eduki, iluzio  
estis ŝia, kaj ĉiam kun espero,  
ke instinktoj infanaj per konscio  
vivu for de l' malamo kaj kolero.

Tial, arde bruligis ŝi la flamon  
de l' infanaj koretoj al la bono ;  
tial, same instruis fratan amon  
por samuloj, la emon al sindono ;  
voli por la ceteraj tutan samon,  
kion por ni mem, estu la ordono.

Esti noblaj, modestaj, doni manojn  
al falinto, kaj ami la NATURON ;  
al tutmonda feliĉo, fari planojn  
ne de l' vivo hazardan aventuron...  
Edukante tiele la infanojn,  
sentis kore profunde ŝi plezuron.

### II

Bele nigra harar' abunda, brila ;  
frunto larĝa, serena, iom plata ;  
grandaj nigraj okuloj kun trankvila  
penetranta rigardo ; delikata

kaj gracia la nazo ; tre humila  
la ridet' de l' maldikaj lipoj ; glata  
la dentaro perfekta en subtila  
buŝo iom ameme malfermata.

Forte bruna koloro, sed ne pala,  
estis tiu de ŝia la vizaĝo  
bela, longe belforma aŭ ovala,





Amelia

kaj en kiu vidiĝis bone saĝo,  
firma la karaktero tre lojala,  
seriozo, bonkoro kaj kuraĝo.

Estis ŝia la korpo tre gracia,  
delikata, malalta, ĉarmoplena,  
se ne grasa, tre forta, energia,  
kun kapablo pri ĉio tre konvena ;  
kaj la tuta figuro, simpatia...  
Estis al ŝi NATUR' ne sindetena !

### III

Bone konsciu mian la trezoron,  
kiun forrabis ĵus al mi la MORTO ;  
kiel kruele vundis mian koron  
de la FATALO malindulga forto ;

kiel tre grandan akran la doloron  
en min ja trenis tre malbona sorto.  
Ĉu jam forigos mian korangoron  
el mi la pacienco per elporto?

Ho, ve ! De !' MORTO estis la kruelo  
en la okazo mia tre terura !  
Kia ja ĝia malhumana celo ?

Kial mortvelkis mia floro pura,  
ĉarma, junaĝa, kun mirinda belo ?  
Kia respondo?... La silento nura !...

Nura la nevenkebla tomsilento  
estis, al mia la demand', respondo.  
En la tombejo, eĉ ne de la vento  
estis malgranda aŭ tre milda ondo !...  
Certe konsolo estos ne al sento  
mia dumvive en ĉi tiu MONDO !



Amelia

THE PHOTOGRAPHY

### SKIZ-PORTRETO DE MARINA

Ravanta feino  
kun bela vizaĝo ;  
printempa plenaĝo  
de mia filino.

Vizaĝo tre ronda ;  
ĉe l' vangej, koloroj  
de freŝaj la floroj  
en kadro malblonda  
el nigraj la haroj  
brilantaj kaj helaj ;  
sub brovoj tre belaj  
plej belaj najbaroj,  
la nigraj okuloj  
mirindaj kun helo  
de brila la stelo,  
—kaj miaj speguloj!—,  
je ĉiu l' okazo  
rigardas kun varmo ;  
tre plena de ĉarmo,  
korekta, la nazo.

De blanka lekanto  
petaloj, la dentoj ;  
al puraj la sentoj,  
la ruĝa dianto  
de l' lipoj, per rido,  
ĉielon proponas,  
feliĉon ĝi donas  
kun plena konfido.

Tre bele formata :  
mezkrisko, gracio,  
fleksebla talio,  
la man' delikata ;  
piedo subtila.  
Humile kuraĝa,





**Marina**

samtempe tre saĝa  
kaj klera ; ĝentila.

Alloga la pozo  
eĉ tre eleganta,  
neniel, do, vanta ;  
naturseriozo

kun bona humoro ;  
percepto tre klara ;  
ne estis avara  
al fremda doloro.

Ŝi ludis pianon  
per lerto tre ŝika ;  
kaj ŝi, bolŝevika,  
malamis tiranon.

Ŝi estis tre brava.  
«Help' Internacia  
la Ruĝa», al ŝia  
la koro, ja rava ;

kun granda la ŝato  
kaj tre inteligente  
ŝi agis konsente  
kun sia la frato :

«Falĉil' kaj Martelo,  
kvinpinta Ruĝstelo»,  
jen ŝia simbolo ;  
al tiu ĉi celo,  
do, ŝia memvolo !



**Marina**

## H I E R A Ŭ

Printempo florigas belan ĝardenon  
sur freŝa la herbo ĝia, jen, sidas  
tre karaj filinoj miaj kaj ridas :  
rimarku kontenta ĉiun mienon,

ĉar havas neniun ian ĉagrenon,  
plensanaj ja ili vivon avidas ;  
pro tio, samtempe ankaŭ vi vidas  
en ambaŭ vizaĝoj grandan serenon.

Tre karaj filinoj inter lilioj,  
iridoj, siringoj, apud levkojo,  
violoj, lekantoj kaj geranioj,

en plena natura granda la ĝojo :  
ja, estas realo, ne iluzioj ;  
al ili, do, estu firma vivvojo.



**Marina kaj Amelia**  
**hierau en la parko de Jaca.**


## H O D I A Ŭ

Tre karaj filinoj miaj forpasis  
de tiu ĉi mondo al la etera,  
al mondo spirita, tiel mistera.  
Iliajn la vivojn Morto frakasis!

En grandan doloron ili min lasis!  
Pro tio, jen mi nun tute mizera,  
ĉar estas tutplene mi senespera :  
nu ; en min dolor', ruino, amasis!

Jen tombo, en kiu ili nun kuŝas,  
kaj kie fariĝas nune disvolvo  
de korpoj iliaj... ; pensi kortuŝas :

el floroj tre ravaj, karaj, nur polvo!...  
En tombon ilian Forto min puŝas :  
al mia dolor', nur tie la solvo!



**H o d i a ù**  
**(En la civila tombejo de Madrid)**



## TERURAJ DATOJ

De novembro la dudek naŭan  
de l' mil naŭcent trideka jaro ;  
de l' mateno la kvina horo,  
ve !, mi dronas en larma maro :

ĉe l' silento de la tagiĝo  
nur aŭdiĝas murmur' de l' ploro  
mia ; kaj de filino kara,  
malrapida la mortstertoro

kaj apenaŭ aŭdebla voĉo  
sin turnanta al mi laŭ jene :  
«Paĉjo, paĉjo, mi mortas... mortas !»  
ĉiufoje ja des pli penie...

Dume ŝi min rigardis ame  
kaj mi vidis foriri briloj  
de l' okuloj tre belaj ŝiaj, ,  
kaj vitriĝi ŝiaj pupiloj !...

Miaj lipoj en palajn ŝiajn,  
mi ricevis la lastan spiron  
ŝian ; sentis en mian koron  
mi, akute, profundan ŝiron !

\*

Estas je la dek-oka, marto ;  
jaro mil naŭcent tridek tria,  
je l' mateno. Verŝajne ĝoje  
kantas, kantas filino mia ;

ŝi kantadas, Marina ! Poste  
jen silento je l' horo deka,  
kiun tuje subite rompas  
de pistolo la paf' seka,

tute sekve tre longa veo  
kaj tre klare kun energio :  
«Paĉjo, panjo, mi min mortigis !»...  
Aŭtomate pro l' paf' kaj krio

al tre kara filino mia  
tre rapide mi kuras, saltas.  
Jen ŝi, pala, en bruston manoj,  
paŝas sanceliĝante, haltas

ŝi en miajn tremantajn brakojn.  
Mi subtenas ŝin kaj demandas :  
«Kio al ci okazis? Marnjo!»...  
Mian koron terure fandas

la dolor' pro silento ŝia  
kaj pro vundo, en ŝian bruston,  
laŭ elmontras makulo ruĝa  
de la sango formanta kruston

sur la blanka velure bela  
ŝia haŭto kaj ĉe la koro...  
En la brakojn patrinajn lasas  
mi filinon, ĉe l' koridoro.

Krias mia edzino : «Marnjo,  
kio estis, por ke ni sciu?!»...  
Kaj respondas ŝi energie :  
«Panjo, panjo, al mi ne krii!»...  
.....

Al proksima la hospitalo  
ni kondukas ŝin kun anhelo,  
kun espero : de l' kuracistoj  
tuj sukcesu savonta celo.

Kuracistoj la tutan eblon  
faris sperte dum kelkaj horoj ;  
tamen ĉio rezultis vana :  
jen denove, do, la hororoj

de la frato, patrin' kaj patro  
senkonsolaj jam senespere  
ĉar karega Marina mortas  
je kruela la hor', vespere.

Sed ankoraŭ doloroj pliaj  
estas al mi : de l' hospitalo  
la kadavron tuj oni portas  
al komuna kadavrohalo,

kie oni malpie metas  
de Marina la korpon ĉarman  
sur mallarĝan malaltan ŝtonan  
tablon, tiel, glacimalvarman...

Mi rimarkas najbaran tablon,  
kaj, sur ĝin, ne de l' morto pacon,  
de malfeliĉulin' vestita  
el ĉifonoj, jes, la grimacon,

kvazaŭ la karulinon mian  
la malfeliĉulino mokus...

Mi eliras, ĉar se mi restus,  
la doloro ja min sufokus,

ĉar en tiu komuna loko ;  
por la mortegaligo, paso ;  
tio brute vidigas lukton,  
la batalon de klas' al klaso.

.....

Karulino, pro kio sorto  
estis al ci tiel fatala ?  
Kial, do, cin mortigis amo  
al fihomo tre mallojala ?

### CARIDAD KAJ MATILDE

Mi, nun, per ĉi tiu soneto volas  
ne restu jam en la forgeso tuta  
aliaj du karaj filinoj. Rolas  
ja ili en mia dolor' akuta,  
kaj kiam nenio, do, min konsolas  
el kora profunde la vundo bruta,



**Matilde**

kaj ĉe l' rememoro mi nur izolas,  
ne povas pri ili mi resti muta :  
nu ; estis Caridad filin' unua,  
sed, kiam ŝi estis dekokmonata,  
ŝi mortis. Ho, je la ekvivo frua !  
Matilde, la tria, tre delikata  
kaj bela, kvarjara, kun ĝojo brua...  
Ŝin rabis la Morto tre senkompata !

## SONĜO KAJ SOPIROJ

Animo subtila  
el brusto trankvila,  
dum dormo, eliris ;  
al fulma vojaĝo  
eliris el kaĝo.  
Al kie aliris ?



**Mia edzino Josefa Sanz Acón**

Ĝi flugis kontenta  
sub luno arĝenta.  
Animo sopiris !  
Ĝin gvidis Destino  
al kara edzino...  
En sonĝo mi miris,

ĉar jam mi ŝin vidas  
ĉar jam ŝi min ridas...  
Ni kore nin diris !...

.....  
Mi sentis korskuon  
finanta diĝuon :  
vekiĝo ŝin tiris !...

Dum dormo aliras  
al vi la animo ;  
vekite, esprimo  
al vi mi sopiras  
konstante, sen limo !

Maroka tendaro. 1923.

## **TAGIĜO KAJ ESPERO (1)**

*Al mia filino MARINA.*

La tagiĝo rompas  
de la nokt' vualon,  
birdoj jam ekkantas  
kaj gajigas valon.

Oriento roze  
ekbruliĝas rave ;  
la trumpet' sonoras  
alvokante grave :

tuj la trumpetaroj  
kun tamburoj, kune,  
salutadas tagon,  
kun espero, nune.

En la horizonto  
jam la sun' aperas ;  
de la nova tago  
ĝojon mi esperas ;

---

(1) Verkita en Maroko, dum milito, 1923.

jen de l' tag' la flustro :  
«Tuj la PAC' alvenos!»  
La esperon belan  
cia brust' entenos ;  
min atendu, kara  
MARNJO!, sen angoro ;  
por la rekuniĝo  
proksimiĝas horo!

.....

Sed dek jaroj pasis  
de la dat' de l' verko...  
Ne plu la rekuniĝo!...  
Mia MARNJ'..., en ĉerko!...

### **POR LA TOMBSKRIBAJO NIA**

Vi haltu ĉi tie momenton ;  
meditu !  
Laboru vi «Novan la Senton» ;  
hezitu !  
Por trafi tutmondan kontenton,  
vi spitu !

Vivanto, de l' «Nova la Sento» spirito  
potenca, fratiga, la Mondon jam krozas.  
Nu ; via la koro ne restu granito  
al diro de kiuj ĉi tie ripozas  
eterne sub tiu ĉi peco el roko ;  
post tiu MEDITO, sen ia HEZITO,  
kaj kaŭze de nia humana l' alvoko,  
fratigu la homojn ; ne plu jam milito !



## JE LA MORTO DE TH. CART

Jam homo kara, sciulo sen vauto,  
tre grandanima al ĉiuj amiko ;  
kun koro pura laŭ blanka lekanto,  
en kiu nestis neniam skeptiko,  
en kiu, kiel en freŝa dianto  
tre ruĝa, ĉiam vidiĝis fortiko  
al celo rava de lingv' Ĝesperanto  
per fajraj saĝo, konsil' eĉ mistiko ;

la homo kara ĵus mortis ! Atenton  
tre viglan metu al lia la volo :

*«Konservu ni ĉiran la Fundamenton ;*

*ni ĵosu nian la sulkon»*, jen rolo  
komuna ĉies ; vigligu la senton  
al lingvo : gvidu nin, do, l' apostolo.

De l' *Blankbarbulo* aŭskultu ni *«Vorton»* :

konsilon ĝian konstante ni aŭdu,  
al niaj koroj ĝi donu la forton ;

viglecon ĉies la *«Vorto»* ja plaŭdu,  
farante tiel sukcesa la sorton

de l' lingvo. Gloran Cart ĉiam ni laŭdu !

## A S T U R I A S

### I

Ho, kamparo ĉarma, rava, trankvila,  
kun mistika absoluta sereno ;  
kies belsmeralda verdo aprila  
estas nuancata de l' rosmareno,  
de krataga la rozeto humila,  
de l' lavendo, de l' irid' kaj jasmeno,  
de l' violo, kvankam kaŝe, belbrila ;  
de l' lekanto !... Ho, mirinda edeno !

Kie dise ĉie staras kampdomo,  
apud kiu kamparano laboras ;  
ĉirkaŭ kiu boske arbo de l' pomo

tre mirinde kaj ravante plenfloras ;  
plena de saniga arbararomo  
kaj en kiu la malĝojo, do, foras.

## II

Ho, mirinda ĉiam verda kamparo,  
kies altaj montoj ombre grizbluas,  
inter kiuj la riveroj sen baro  
ĉu torente aŭ kviete trafluas  
oferiĝi ĉe l' potenca najbaro  
de la lando, kiu ĉiam ĉu bruas  
milde, ĉu tre furioze ; ĉe l' maro,  
kiu landon kisas aŭ, ve !, frapskuas.

En ĉi tiu ĉarma lando, la grilo  
kvazaŭ psalmkantadas al la ĉieloj  
sub palpebrumanta milda la brilo  
de ravege brilantaj la steloj ;  
kaj sub tiu de la sun', kun subtilo,  
zumas kaj zumadas la abeloj.

## III

Ho, mirinda lando ! Danku la Dion,  
kiu komplezeme certe cin benis,  
kaj eĉ por liveri al ci, ja, ĉion  
tute malavare ne sin detenis.

Font', arbar' kaj maro, glormelodion  
kantas en la land', al kiu altrenis  
la riĉeco homon, kies pasion  
por la land' neniam foro deprenis,  
ĉar virinrigardo estas susuro  
alloganta ; ĉar aŭdante ŝin, miro  
de la hom' fariĝas kora plezuro,  
ama nekontraŭstarebla l' altiuro,  
nerompebla ĉiamdaŭra la ŝnuro  
lin liganta al la hejma deliro !

## AL HECTOR HODLER

(Okaze de lia morto)

Ĉu falis en nin grandega malbeno?  
La MORTO kial denove nin batis?  
Karulon, kies la agojn ni ŝatis,  
ĝi rabis! Kial? Ve, kia ĉagreno!  
Kolera MORT' ne laciĝas, sen peno  
ĝi agas; ŝajnas ke oni ĝin flatis.  
Ĝi FRATAN RONDON neniam kompatis,  
elprenon faris al ni post elpreno.  
La SORTO al ni terura tro estas!...  
Ĉu estas tia SORT' puno de DIO?  
Funebre Esperantistoj sin vestas!  
Ĉu silentege kaj sen dolorkrio,  
pro grandaj batoj mortante ni restas?  
*«Antaŭen—aŭdu—, kaj spite de ĉio!»*

## DE TRA FERA KRADO

### I

Jen mallibera mi en mia ĉelo;  
sed en ĝi estas al mi ne la honto.  
Mallibereco estas kvazaŭ ponto  
ja kuniganta firme laŭ nivelo  
la suferantajn klasojn sub ĉielo.  
Kvankam, de tra la krado, horizonto  
estas mallarĝa; tamen alta monto  
bela vidiĝas: same mia celo!  
Apud la krad', ĉe l' citadela korto,  
unuavice, bruta jen kanono  
preta paroli raŭke pri perforto  
kontraŭ kiu ajn prava la rezono;  
plie, soldatoj, iloj por la morto  
pretaj... Terura povo de l' malbono!

Spite de tio, ne audigu voĵojn ;  
male, pontencavoĉe ni esprimu  
kore malŝati la diablokreojn,  
kiujn neniam ni plu iel timu ;  
ni triumfigu pacajn la ideojn :  
vere la homoj, fratoj, sin estimu !

## II

Firma la roka grandioza bloko  
bone al mia koro ja simbolas,  
kaj en la cerbo mia arde bolas  
penso homama de la «*Forta Foko*»,  
same tre firma, kiel monta roko,  
sento potence en la koro rolas ;  
kvankam en ĉelo tute mi nun solas,  
ne min doloras de l' izol' sufoko.

Roka la mont' majeste alten staras  
super de ĉio, super de l' tegmento...  
Super de l' monto, la ĉielo klaras  
je l' ektagiĝo ; malvarmeta vento  
lekas la fruntan mian ; post ĝi aras  
pensoj, ideoj, pri la «*Nova Sento*» ;  
pensoj, ideoj, kiujn ne detenis  
saĝe potenca mano de l' Destino ;  
pensoj, ideoj, kiuj en nin venis,  
spite de ĉio, de l' *Natura Sino*,  
kiujn tutklare homoj jam komprenis  
esti de la Socio Nuna fino.



De tra fera krado

## PROFUNDA AMO

Neniĉel mi volas esti anĝelo  
ĝuanta por ĉiam apud la Dio ;  
neniam aliri al la ĉielo  
jam estos por mi de nun iluzio,  
ĉar forte katenas min terpasio.  
Mi, male, fariĝi volas abelo  
humila, libera, ĉu papilio,  
ĉe l' tera la krust', ĉe l' tera la ŝelo  
por ĝui ravantan vian la belon  
de via vizaĝo, blankan lilion ;  
gustumi, de viaj lipoj, mielon,  
la dian nektaron kaj ambrozion ;  
de viaj okuloj, bruli en helon,  
por morti dirante aman ekkrion !

## ANTAŬSENTO

Ventego terure minace ekblovas  
kaj branĉojn de l' arboj fortege ĝi skuas ;  
nu, tial, tro ĝi foliaron dismovas ;  
timige folioj kun vento fortbruas  
kaj legi atente nun mi jam ne povas,  
ne plu de l' legado la ĝojon mi ĝuas,  
ventego la pensojn, ideojn forŝovas.

Mi tremas !... Pro kio? Ve! Kia kialo?  
Mi staras... Bruego trairas tra l' valo,  
kaj ĝi min korpremas, ĝi, kiam alvenas,  
ve!, kvazaŭ kriego de granda fatalo ;  
al hejmo nekontraŭstareble min trenas  
doloro intensa, anima defalo...

Ve, jen la kialo : decidis DESTINO  
por frata l' amiko alvenon de l' FINO !

## P R I A M O

Amo estas sento tre natura,  
ĝi en fundo de la koro nestas :  
jen, ĝi estas sento tutplezura ;  
jen, dolora sento, amo estas ;  
jen, melankolia, ĉasta, pura...  
Tamen, amo ĉiam sankta restas,  
kaj poetoj ĝin ja kantas, festas !

Pro la am', la fianĉin' sopiras ;  
la patrino tute sin oferas,  
ĉar al filo ĉion ŝi deziras ;  
homamanto agas kaj esperas,  
kvankam oni diru : «li deliras»,  
tamen la deliro ja prosperas :  
utopio tute jam ekveras !

Pro la amo sankta por scienco,  
multaj homoj arde nun laboras  
kun plezuro, zorgo, pacienco,  
kaj por bono la scienco floras ;  
de la civitano konscienco  
pro amo al fremduloj ĥoras :  
en militon penso nin doloras !...

Ian amon ĉiuj ambicias,  
kaj atingi l' amon ĉiuj penas ;  
amon al la gloro mi konscias,  
kaj ĉi tiu amo nun min trenas  
al la kanto : gloron mi envias.  
Tial, min nenio jam detenas,  
kaj mi kanti amon entreprenas.



## K A V A L I R A   A M O

(MEZEPOKAJO)

Ĝestas ĉe kastel' sur roko.  
Per ravanta voĉesprim',  
de sub turo, kantalvoko  
plena de la sentsufoko  
supreniras de l' anim'  
de ĝentila trubaduro  
kavalira, juna, brava,  
kies voĉo estas rava,  
por la koro ja plezuro.

Ĝestas kanto varma ;  
estas harmonia  
de l' liut' pasia  
la muziko ĉarma.

Per la melodio,  
amon li konfesas ;  
ankaŭ li promesas,  
je la sola DIO,  
ĉu ŝi amon jesas :

«Jesu, jesu !»...  
la liuto diras.  
«Jesu, jesu !...  
DIO, mi sukcesu !»  
Trubadur' sopiras.

\*

De la nokto, sub lazuro,  
en silento kaj mister',  
de la supro de la turo  
kaj irante laŭ la muro,  
voĉ' aŭdiĝas al la ter' ;  
de feino rave bela  
oni aŭdas jesan diron.  
La bravegan kavaliron  
ŝajnas ridi luno hela !  
Diras jam kun ĝojo

voĉo simpatia  
de l' feino dia,  
je la lasta fojo :  
«Ha, en via koro  
am' por mi jam nestas ;  
via, do, mi estas  
de ĉi tiu horo !  
Mi fidela restas !  
Fidu, fidu,  
ĉar por nia l' amo,  
fidu, fidu,  
ni neniam vidu  
estingiĝi flamo !»

Kaj la brava amkantoro,  
kiam tion de l' feino aŭdas,  
kio lian koron ĝoje plaŭdas,  
kiam ĉesis amangoro,  
tre kuraĝa kaj pasia ion petas...  
Ne atendis li respondon, kaj li ĵetas  
fortan silkan ŝnuron  
trafe sur la turon,  
kaj li lerte supreniras.  
Ŝi, vidante, tuj sopiras,  
kaj ŝi svenas...  
Li ŝin prenas  
de sur la pavimo  
kaj sen ia timo...  
Ŝi sur bruston kuŝas  
de l' feliĉa kavaliro.  
Ŝia la sopiro  
lin kortuŝas,  
kaj devigas lin al diro :  
«Amatino kara,  
rekonsciu ;  
nin enviu  
bela luno klara !»  
Dir' de l' trubaduro  
estas ja plezuro

kiu en ŝin venas.  
Revenante al la viv' reala,  
ŝi ne sin detenas ;  
**ŝi** sin montras tre lojala :  
**ŝi**, do, flustras amparolon  
en la kavaliron  
esprimante sian volon,  
sian la deziron  
esti ĉiam lia  
kore, tre pasia !...  
Tiel, ambaŭ koroj  
unu la alian diras  
dum sinsekvaj horoj.  
Noktvualon tag' ekŝiras  
**kaj** la luno ĵus sin kaŝis  
preter de altano,  
kiam man' ĉe mano,  
ili sur la turo paŝis.  
Tial venas diro adiaŭa :  
«Ĝis la rekuniĝ' morgaŭa !»...  
Kaj tuj sonas dolĉa tuŝo  
de la lipoj buŝ' ĉe buŝo,  
por atesti, ke de l' amo  
ĉiam brulas arda flamo !

## PLENDO KAJ VENGO

(DAŬRIGO de la ANTAŬA)

Mia kanto, mia kanto  
estas kanto de l' angoro  
de humila amkantoro,  
de konstanta la plendanto  
konfuzita de doloro,  
kiu nestas en la koro  
senkonsola de l' amanto ;  
pro kruela rememoro,

mia kanto estas ploro :  
belan, kiel la dianto,  
al mi rabis, kiam floro,  
kavaliro sen honoro  
amatinon ; jen doloro  
de ĉi tiu suferanto !

De tiam sopiras  
senĉese animo,  
la mia, kaj iras,  
pensante pri l' krimo,  
serĉadi friponon,  
havante la celon  
por venĝi malbonon  
mortigi nobelon :

li havos la morton  
de brako la mia,  
ĉar havas ĝi forton  
de l' nepra kaj dia

DECIDO, fatala  
por fikavaliro ;  
tutkora deziro  
por amo lojala  
de kvazaŭ martiro.

.....  
.....

Ne miru, sinjoroj,  
pro diroj jam tiaj ;  
ĉe ni, amkantoroj,  
amaĵoj pasiaj,  
legendoj, doloroj...,  
ja nestas en koroj.

Nin kant' interesas,  
traktante legendon,  
kaj tute mi jesas  
tre vera l' ofendon.

Sed, ĉu l' ofendito  
la glavon, do, svingis

kaj venĝon atingis  
al tia bandito?

Legendo ne diras  
pri justa la puno,  
sed ĝin sub la suno  
bonuloj deziras!...

### ĈIAM ESPERO!

Feina voĉo al mi ne trilas  
anĝele kun saĝo ;  
okuloj miaj ankaŭ ne brilas  
kun plena kuraĝo.  
Rabante al mi vian la ĉarmon,  
la TEMPO forpasis ;  
rabante de la koro la varmon  
la TEMPO min lasis.  
La TEMPO min ĉagrenis profunde,  
pasigis ĝi jarojn  
rapide, kaj blankigis abunde  
ĝi miajn la harojn !

Kaj aĝo, ve !, mia  
jam estas aŭtuna ;  
sed koro, tre juna,  
ankoraŭ pasia.

Ha, ĉiam por koro  
brulanta pro l' amo  
kun arda la flamo  
ne venas lasthoru !

Al koro ne estas  
amfino fatala,  
ĉar ĉiam lojala  
la koro ja restas !

Kruele DESTINO  
kondutis sin dum ĉiu momento ;  
sed certe la fino  
alvenos ja por mia turmento,  
amata feino !

## A L B R U N U L I N O

(MALLONGAJ SEGIDILJOJ)

Dum la nokto ne brilas  
  steloj ĉielaj,  
kiel ŝiaj okuloj,  
  multe pli belaj.

Kiam indifereinte  
  ŝi min rigardas ;  
maltrankvilo, ĉagrenoj,  
  en mi plenardas.

Se rigardas ameme  
  ŝi, ha !, jen ravo ;  
rigardato sin sentas  
  ŝia la sklavo.

Nigra estas—laŭ diro—  
  la pesimismo,  
tiel nigra multfoje,  
  kiel abismo ;

kaj en ambaŭ tutsame  
  vidas ni penojn,  
vastan ombron teruran,  
  grandajn ĉagrenojn.

Kvankam ŝiaj okuloj  
  estas tiele,  
nigraj, kvazaŭ la steloj,  
  brilas tre hele,  
tute plenaj de lumo,  
  plenaj de ĉarmo,  
de promesoj, allogo  
  kaj de amvarmo.

En nigreco ilia  
  oni divenas  
ĉiam daŭran feliĉon...  
  Kiun ni penas !

La nigreco ilia,  
  iam plezuro,

—ho, kontrasto! —fariĝas  
foje teruro!  
Siaj vangoj similas  
rozau la belon;  
tial, ili facile  
trompas abelon.  
Estas ŝia la frunto  
tute perfekta;  
estas ŝia la nazo  
tute korekta.  
Malfermiĝas la lipoj,  
ruĝa dianto,  
kaj jen perloj pli belaj  
ol brilanto.  
Sian hararnigrecon  
karbo envias;  
ŝia belo tiele  
kulminacias.

## PRI ONDOJ

(SEGIDILJOJ)

De l'etero rapide  
fluas la ondoj  
ĉiam ĉe l' atmosferoj  
inter la mondoj.  
Fulmaj de nuboj  
l' ondoj foje fariĝas  
morto kaj ruboj.

\*

Ondoj de l' telegrafo  
kaj telefono,  
gravaj komunikiloj  
por la diskono  
de la progreso;  
sed RADIO plej granda  
lasta sukceso.



Ondoj puraj de l' lumo  
kaj de la varmo  
ĉion plene vivigas  
forte kun ĉarmo ;  
kaj de l' sonoro  
tre ravantan feliĉon  
donas al koro.

\*

Mildaj ondoj de l' maro  
venas, revenas  
en marbordon ; neŝiam,  
de, sin detenas  
ili ; senĉese  
ili fluas, refluas  
ĉiam karese.

\*

Sur la sablo de l' fundo  
ili ja rulas ;  
ili same konstante  
algojn ja lulas.  
Sub la lazuro,  
de la ondoj lulemaj  
estas murmuro.

\*

Kiam fluas ĉe l' maro  
milde la ondoj  
al la bordo sinsekvaj,  
ĉiuj en rondoj,  
ili, ĉu diras?...  
Karulino, pro amo  
ili sopiras!...

\*

De la maro la ondoj  
tro furiozaj  
altajn rokojn batadas,  
kaj grandiozaj

l' ondoj tro bruas ;  
tre potence, la rokojn  
ili reskuas.

\*

Tiuj ondoj teruraj  
kaj tre koleraj,  
estas vere samtempe  
kvazaŭ misteraj.  
Kaj ĉu vi scias  
kion ili parolas  
diras aŭ krias ?

\*

Kion diras la ondoj  
malbonintencaj,  
refrapante ŝtonegojn,  
tiel potencaj,  
ke nin korpremas  
furiozo ilia ?...  
Ili blasfemas !

\*

De l' popoloj la ondoj  
estas similaj,  
kiaj tiaj de l' maro :  
foje, humilaj ;  
foje, kruelaj ;  
laŭ okazoj diritaj,  
ĉiam samcelaj !

\*

Amaj ondoj potencaj  
de la okuloj  
ĉiam tra okulharoj,  
kvazaŭ tra tuloj,  
trafas la korojn ;  
kaŭzas ondoj malamaj  
akrajn dolorojn.

\*

Al okuloj tre nigraj  
estas koloro  
de l' malhela profundo,  
de korangoro  
kaj de ĉagreno  
granda, de la terura  
grava vivpeno.

\*

Kvankam nigraj okuloj,  
ŝajne trankvilaj,  
vin rigardu, ne fidu  
esti humilaj :  
Kaŝas la celon  
ruzaj nigraj okuloj  
en la malhelon.

\*

Belaj bluaj okuloj,  
kiel violoj  
de la plantoj humilaj  
ĉe la izoloj,  
korojn konfuze  
ravas kaj frenezigas  
tute ĵaluze.

\*

Ŝajnas bluaj okuloj  
ĉiam kvietaj,  
ami pacon, al bono  
esti, do, pretaj ;  
tamen, ne fidu :  
sub kvietan supraĵon,  
riskon vi vidu.

\*

Vundis bluaj okuloj  
mian la koron,  
kaŭzis ili kruelan  
mian doloron !

Akraj suferoj  
estis al mi la nigraj  
kiel karberoj!

\*

Ondoj de la okuloj  
tuton ja povas,  
ĉar al ili, magnetoj,  
homoj sin ŝovas,  
kiam rigardo  
de virino la ondojn  
sendas kun ardo!

### NE PLORU!

Ne ploru, roza vizaĝo,  
ne ploru ; estu kuraĝo !  
Ne ploru, ĉar mi ne ploras,  
kvankam milito bruta  
kruele jam nin doloras.

Ne ploru, roza vizaĝo,  
ne ploru ; estu kuraĝo,  
karulnjo plena de ĉarmo,  
ĉar mi vin amas sole  
kun granda kora la varmo.

Ne ploru, roza vizaĝo,  
ne ploru ; estu kuraĝo,  
ĉar ĉiam al vi mi koros,  
dum mi en la milito  
lacige, pene deĵoros.

Ne ploru, roza vizaĝo,  
ne ploru ; estu kuraĝo :  
mi restos al vi fidela,  
kvankam foresto mia  
fariĝu tute kruela.

Ne ploru, roza vizaĝo,  
ne ploru ; estu kuraĝo,  
ne ploru, ĉar mi revenos  
spite de l' cirkonstancoj,  
tutcerte pastro nin benos !

## SOPIROJ DE ORFO

De l' patrino l' amon  
mi neniam ĝuis ;  
aŭdis mi nur famon,  
kiu koron skuis,  
pri ĝi. Sian mamon,  
do, mi ne gustumis ;  
la pupilo ŝia  
eĉ por mi ne lumis ;  
ne ŝi ambicia  
iam min parfumis  
per la sia spiro,  
kiun filo ŝatas  
kun tre granda miro,  
kiu ŝin rilatas,  
ĉies laŭ la diro.

Si neniam prenis  
min ve ! akurate,  
ŝi nek iam tenis  
min kordelikate  
aŭ min varti penis.

Kaptis min malsano,  
mi sur lito restis ;  
fleg' de ŝia mano  
jam al mi ne estis !...  
—Morto-uragano !—

Sian la parolon  
dolĉan mi ne aŭdis...  
La patrinan rolon

ĉiam ĉiuj laŭdis !  
Sentis senkonsolon  
    grandan mia koro,  
ĉar ETERNA FORTO,  
kaŭzo de doloro,  
la KRUELA MORTO,  
rabis ŝin je floro !

Manka de zorgemo  
de l' patrino kara,  
en la koron premo  
sur la voj' malklara,  
en la korpon tremo,  
    vivon mi eniris,  
tre malgaja, sola ;  
ofte mi sopiris  
tute senkonsola,  
kiam vivo tiris

    min al la batalo.  
Tiam mi enviis,  
ĉe la larmovalo,  
tiun, kiu sciis  
ne pri la fatalo  
    perdi la patrinon,  
sindonemon ŝian ;  
kies la destinon  
zorgis ŝi kaj ĝian  
malproksiman finon ;  
    kiun ŝi karesis  
kaj ŝmacadis rave ;  
kiun ne forgesis  
ŝi konsili prave  
dum li malsukcesis.

La patrino amo,  
la plej malavara,  
kies arda flamo  
estas bele klara,  
laŭ atestas famo,  
    estas granda belo,

kies helo brila  
eĉ de bela stelo  
estas ne simila  
en serenĉielo.

La patrinon gloras  
amantema filo,  
ĉiuj ŝin memoras  
ĝoje kun trankvilo;  
dume mi ŝin ploras!  
Min la perd' doloras!

## AL MIA NASKIĜLANDO

KUBO, lando bela  
de l' brilanta sun',  
de l' belege hela  
kaj arĝenta lun' ;

kvazaŭ kora psalmo  
jam deziras mi,  
lando de la palmo!,  
estu kant' al ci.

Al la bluaj ondoj  
de la cia mar',  
en la tutaj mondoj  
estas ja nek par' :

ili milde rulas  
por karesi cin ;  
ili, do, cin lulas  
ame kaj sen fin'.

Marcj kaj ĉielo  
de la mia land'!,  
kunmiksiĝas belo  
ĉe la monda rand'!

Granda, de l' lazuro  
cia, estas rav' ;  
riĉa, sen mezuro,  
estas cia hav'.

Cia fruktodono,  
lando de la kaf'  
kaj de l' mahagono,  
estas bona traf',  
ĉar la cia grundo  
donas ĉe l' eben',  
ĉe l' dekliv', ĉe l' fundo,  
fruktojn eĉ sen pen' :

donas ĝi bananon  
kun arom' de flor',  
ankaŭ sukerkanon  
fariĝontan or' ;

eĉ tabakon donas  
de l' kamparo riĉ',  
ĝi por homo tronas  
—sola malfeliĉ' !—

Ne la monumentoj  
de l' arkitektur'  
estas al la sentoj  
grava la plezur' ;  
sed jes de l' Naturo  
ĉiamdaŭra bel',  
kaj de la lazuro  
la ravanta hel'.

En la grotoj nombraj,  
je la lum' de torĉ',  
malaperas ombraj  
densoj laŭ ensorĉ' ;

kaj fariĝas ĉio,  
antaŭ la okul',  
hejm' de iu DIO,  
pova senmortul'.

Valoj kaj altanoj,  
milda riverflu',  
kamp' de sukerkanoj!...  
Ĉie ĝoj' sen bru' !

Arboj tre gigantaj  
kun konstanta flor',



palmoj elegantaj,  
ravo de la kor'!

Eĉ de la serpento  
granda, ĝia ramp'  
estas ne turmento  
en la kuba kamp';  
vivas ĉiam pace  
en arbaro ĝi,  
rampas ne minace  
tiu reptili'.

Naĝas, en rivera  
sia la lulil',  
preskaŭ sendanĝera  
kuba krokodil'.

Riĉa ha! de floroj  
estas mia ter';  
estas ĉi al koroj  
lando de l' esper'.

Fruktojn multenombrajn  
ja produktas ĉi;  
trovas densojn ombrajn  
en arbaroj mi.

Riĉa je koloro  
estas birda plum';  
kaj varias floro  
troe ĉe la hum'.

Flustras, jes, la fonto  
kaj la mara vent',  
trilas la *sinsonto*  
ĉarme por la gent',  
dum la suno brilas  
super de la mont',  
tre ravege trilas  
bela la *sinsont'*.

La rivera fluo  
de la *Jumuri'*,  
vera dia ĝuo  
inda je l' envi';

la supraĵo ĝia,  
delikata tul' ;  
de pejzaĝo tia  
inda la spegul'.

Estas, tiel samaj,  
kiel tiu val',  
eĉ aliaj famaj,  
la spirit' regal'.

Kiel riĉa estas  
cia tera krust' !...  
Kia sento nestas  
en la mia brust' !

De la indiĝeno  
kora la sindon'  
estas dia beno,  
estas dia bon' ;  
lia simpatio  
estas ja ornam' ;  
lia fantazio  
kvazaŭ arda flam' ;  
estas li tre nobla,  
brava kavalir' ;  
lia sento, obla ;  
gaja lia dir'.

Ĉarma iluzio  
la virina bel' ;  
ŝia la gracio  
venis de l' ĉiel'.

Ĉu ve ! la doloro  
akre vundas vin,  
petu vi al koro  
—ha !—de kubanin'.

KUBO, lando bela  
de l' brilanta sun',  
de l' belege hela  
kaj arĝenta lun' !...

Ha, la mia gento !...  
Ha, la naskiĝlok' !...

Al la mia sento  
estas jam sufok',  
plu ne kanti povas,  
jam silentas dir',  
vent' de mi forblovas  
veon de l' sopir'!...

## HA, SEVILJO!

Seviljo, jen korvarma  
mia la miro  
al urbo de la ĉarma  
*Gvadalkiviro.*

Ha, urbo de la maŭroj,  
riĉa de floroj,  
artaĵoj, lumo, taŭroj,  
toreadoroj!...

*Seviljo*, via gloro  
brilas kun helo ;  
kaj estas rav' al koro  
via la belo !

Jes, de la katedralo  
tuta l' interno  
fariĝas ja regalo  
por la homkerno :

tre larĝaj altaj navoj,  
riĉaj kapeloj,  
iliaj la enhavoj  
artaj juveloj :

pentraĵoj, maŭzoleoj,  
ĉiuj altaroj,  
skulptaĵoj kaj trofeoj,  
pastraj vestaroj...

Mirinda la trezoro,  
supermezuro :  
arĝento, silko, oro,  
ĉia veluro,

multnombraj riĉaj ŝtonoj,  
bronzo kaj fero,  
marmoro..., ĉiaj donoj  
riĉaj de l' tero,

tre arte, grandioze,  
tute belbrile  
kaj, kvankam serioze,  
ankaŭ subtile

aperas. Ho, spektaklo!  
Homa genio  
montriĝas, do, miraklo  
ĉe l' sakristio!

Ĝi ŝajnas de ekstere,  
sub la luntorĉo,  
arĝenta kaj mistere  
arta ensorĉo!

La katedralo estas  
riĉa muzeo,  
artaĵoj ĉe ĝi restas  
de la moskeo.

Pro ĝia maŭra turo  
ĉiuj ja miras ;  
ĝi fonon de l' lazuro  
ŝajne disŝiras.

Ĉe l' pinto Fidstatuo,  
kiun turnmovas  
aera ĉia fluo  
kiam ventblovas.

*Hivalda*, arte riĉa  
turo mondfama  
de l' urbo tre feliĉa,  
gaja kaj flama ;

ĉu fingro de l' Destino,  
montras ĝi vojon  
por iri al la fino  
lastan la fojon ?

Ja diras pri la glora  
granda kulturo  
hispanaraba, ora,  
tiu ĉi turo !

Multnombrajn belajn turojn  
vidi vi povas ;  
en korojn la plezurojn  
ili enŝovas :

de l' *Or'*, apud de barko,  
ĉe la rivero ;  
kaj turon *Sankta Marko*,  
maŭrekzemplero

ĝi estas, tipa, bela ;  
de *Don Fadriko*,  
tre arta, ne samcela,  
vera fortiko !...

La turojn de l' remparo  
pure romana  
kaj eĉ de l' *Alkazaro*  
maŭro-hispana.

En tiu ĉi, salonoj  
tre fantaziaj,  
ĉizitaj la plafonoj  
kolorvariaj,

la brikoj emajlitaj,  
kolongracio,  
arkaĵoj tre spiritaj  
de l' galerio,

ornamo de la muroj... ;  
ĉio subtila  
en ĉi arkitekturo  
estas, plenbrila !

De l' Pupoj kaj Fraŭlinoj,  
ravaj la kortoj...  
Pri tio ĉi jen finoj,  
mankas la vortoj

por bone plenesprimi  
tiom da belo,  
ne povas mi ĝin rimi !...  
Ho, ve, ĉielo !

Arĥiv' pri Ameriko  
riĉon multhavas.  
Artbrila ceramiko  
ĉiujn ja ravas.

Abundaj, jes, laŭ centoj :  
riĉaj muzeoj,  
palacoj, monumentoj,  
parkoj, aleoj...

Hispanamerikana  
Ekspozicio...  
Tre grava kaj ne vana  
la industrio...

Multuloj mire diras :  
«Sanktan semajnon !»...  
Multuloj, do, sopiras  
al ĝi la trajnon,

por ĝui ĝin, foiron  
prave mondfaman,  
la plenan ĉarmdeliron,  
urbon korflaman !...

Tre gaje delikata  
la *segidiljo*,  
de *Bizet* tre ŝatata.  
Vivu *Seviljo* !...

Aliaj multaj kantoj :  
de procesioj,  
laŭ preĝoj de l' kantantoj,  
sentaj ekkrioj ;

la milda kant' al amo  
je l' frumateno ;  
samhore jen balzamo  
de la jasmeno !...

Kaj ĉiam de la floroj,  
kvazaŭ Di-benoj,  
vidiĝas belkoloroj  
en la ĝardenoj :

Levkojoj kaj lekantoj,  
rozoj, lilioj,  
siringoj kaj dianoj,  
la geranioj,

iridoj, krizantemoj,  
multaj aliaj...

Al floroj koraj emoj  
*andaluziaj* !

Pejzaĝo de l' konturo,  
belpoezia,  
sub suno ĉe lazuro,  
ororadia.

Tre forta, riĉa, grundo  
ĉiam promesas  
la fruktojn, kaj abundo  
ĉiam sukcesas :

kamparoj el tritiko,  
el cerealo,  
jen ĉia ora spiko  
ĉie ĉe l' valo.

Vidiĝas de l' olivo  
arb' ĉe l' altano,  
ĉe ie de l' deklivo  
eĉ sukerkano.

Multnombrajn fruktojn donas  
cia la tero,  
ĉi tiun ankaŭ kronas  
Sankta Libero!...

Virino!... Ja gracias  
plena de ĉarmo,  
de l' kor' kulminacias  
ŝia la varmo!...

Se trafus vin ĝentile  
ŝia rigardo,  
amfandus vin subtile  
ŝia korardo.

Pasio, danco, kanto,  
voĉo... kaj belo,  
ŝin faras, sed sen vanto,  
in' de l' ĉielo!

La limo diras : «Cedu!»  
Plumo, do, haltas ;



inspiro tamen, kreu,  
daŭras kaj saltas.  
Jen, ha, *Seviljo*,  
ĉu kanti ĉin mi scias  
per SEGIDILJO?!

## KANTO AL HISPANUJO

### ENKONDUKO

Mi jam volus esti granda la giganto  
de la poezi'... ; ĉar Muzoj  
min neniam helpis, estos mia kanto  
nur de l' fantazio... ruzoj.  
Tamen, kvankam oni juĝu min nesaĝa  
pro pretendo kanti ĉin,  
mi min sentas tute plene ja kuraĝa,  
min timigas ne la fin'.  
Mi penados estu por la kantesprimo  
la inspiro tute rekta,  
same tre belsona kaj kompleta rimo,  
kiel eble plej perfekta.  
La sufiksojn, participojn, mi ne uzos,  
for la rimoj tre facilaj ;  
ilin mi malŝatas, ilin mi rifuzos,  
kvankam estas tre utilaj ;  
min allogas la gracilaj  
versoformoj. Mi kuraĝas ; mi, do, MUZOS,  
kvankam tio ĉi ja kaŭzos  
ke juĝistoj min tre taŭzos.

### I

### ĜIA NATURO

Kaj oras la suno  
kun fajraj la heloj,

arĝentas la luno,  
brilegas la steloj  
ĉe pura lazuro...  
Fariĝas kontento  
ja ĉio, plezuro  
al kora la sento  
en kiu ajn loko :  
ĉe monto, ĉe valo,  
ĉe stepo, ĉe roko...  
Spirita regalo !

De l' maroj la ondoj  
sinsekve ĉu rulas?  
Vidiĝas ne rondoj,  
supraĵon ne lulas.

Sed, jen, furiozaj  
jam ili tre bruas  
kaj tre grandiozaj  
ja ĉion forskuas.

De l' maro ĉe l' bordoj  
de l' Nordokcidento,  
tre vastaj la fjordoj  
ekzistas, sed sento  
pli ĝojas ĉi tie  
se ilin ĝi vidas,  
ĉar ŝajnas, ke die  
NATURO plenridas  
montrante sin bela,  
mirinda, fruktdona,  
varia, ĉiela,  
ne rokmonotona :

sur montaj deklivoj  
de tiuj edenoj,  
jen arb' de l' olivoj  
kaj la rosmarenoj,  
la kverkoj, abioj,  
la pinoj, la fagoj,  
la ulmoj, tilioj  
kaj poploj, kratagoj...

En iuj la lokoj  
de l' akvo la faloj,  
de supren altrokoj  
alsaltas al valoj.

Kaj suben, trankvilas  
la fjordoj tre vastaj  
kaj plumbe jam brilas  
je l' heloj taglastaj.

Kaj arbojn aliajn  
tra ĉie vi trovas,  
arbustojn variajn  
mi citi ja povas.

Kaj jen de la floroj  
la riĉaj omamoj,  
iliaj koloroj,  
iliaj balzamoj...

Jen rozoj, lilioj,  
siringoj, dianto,  
levkajoj, dalioj,  
violoj, lekantoj...

En stepaj mesetoj,  
montaroj kaj valoj,  
troviĝas ĉu betoj,  
ĉu la cerealoj,

oranĝo, citrono,  
la figo, ĉerizo,  
vinberoj, melono,  
persiko, merizo,  
daktilo, banano,  
la piroj, granato,  
eĉ la sukerkano,  
la prunoj, tomato,  
la gros', abrikoto,  
la frago, la pomoj,  
la frambo, karoto...,  
kaj multaj legomoj...

kaj fruktoj aliaj  
de l' riĉa la grundo

eĉ multe variaj  
laŭ plena abundo.

Por iuj destinoj  
oleoj, mielo,  
valoraj la vinoj,  
por ĉia la celo.

Tre riĉa da brutoj,  
da fiŝoj, senfino :  
la salmo, la trutoj,  
merlango, sardino... ;  
da birdoj : pasero,  
kolombo, koturno,  
la koko, ansero,  
perdriko..., la sturno...

Minejoj, metaloj :  
arĝento, la kupro,  
la fero... ; la saloj... ;  
la karboj..., ĉe l' supro

de l' tera la krusto  
aŭ kvazaŭ terkerno,  
laŭ la Naturgusto,  
en ĝia l' interno.

Marmoroj, granitoj...  
Ĉe grotoj, salonoj  
kun la stalagmitoj  
tre vitraj, kolonoj,

kaj kvazaŭ statuoj  
kurtenoj kaj plantoj...  
Ha, kiaj la ĝuoj  
al Naturamantoj.

... ..  
... ..

Cia riĉo, Hispanuj', kulminaciis ;  
tial, cian riĉon tute bone sciis  
multaj gentoj,  
kaj ĝin jam sinsekve ili ambiciis ;  
post la tentoj,

jam sin ĵetis al konkero  
de l' hispana riĉa tero.

## II

### LA INDIĜENO

Nobla, sindonema, lerta !' indiĝeno ;  
tre inteligenta ; aventuron,  
kavalire, memofere, sen deteno  
entreprenas ; sentas li plezuron  
sin montradi ĉiam preta, kaj tre bravas  
kontraŭ maljustaĵo, grandanima  
ĝis la heroeco ; ĉiajn fortojn havas ;  
tre obstina, saĝa kaj sentima.

HO, CI. DON KIHOTO NOBLA !  
CI, HISPANO, ĉiam estas ;  
ĉiam cia celo restas  
ĉe ni por la BON' multobla !

## III

### KULTURO

Mirinda, antikva, hispana kulturo :  
kaj estas impresa afer' kurioza  
ja ĉiaj la konoj pri ARTO. pri JURO  
pri ĉia profunda scienc' serioza,  
samtempe tre grava la LITERATURO.  
Hispana CIVILIZACI' grandioza !  
Okazis tiele dum ĉiuj IĴOKOJ,  
kaj tion ĉi pruvas restaĵoj ĉe lokoj.

De l' prahistoria mistera Epoko  
hispanaj la grotaj ja kaŭzas surprizon,  
ĉar belaj, perfektaj pentraĵoj sur roko  
elmoutras superan prapatrcivilizon  
ĉe GROT' ALTAMIRA, pro kies la belo  
kaj la perfekteco supere tre grandaj,  
la GROTON alnomis «SIKSTINA KAPELO».  
De ĝi, plej perfektaj «bastonoj komandaj».

Kaj dum jarcentara militepopeo  
fariĝis la lando, kaj spite de ĉio,  
impona, vastega, mirinda, muzeo,  
laŭ arta farado de la fantazio :

jen akvokondukoj, teatroj, ŝoseoj  
kaj pontoj romanaj, kaj same remparoj ;  
arabaj banejoj, palacoj, moskeoj,  
remparoj kun pordoj kaj eĉ *Alkazaroj* ;

kaj jen katedraloj, preĝejoj, kasteloj...  
Romana, araba, gotika la stiloj ;  
kaj la renesancaj, barokaj juveloj,  
eĉ la *mudeharaj*, kun tipaj graciloj  
laŭ ARTO de l' MAŬROJ, tre spertaj pri belo.

Pentrist' «*Altamira*», Velazkez kaj Goja,  
vidiĝas genia de l' ART' TRIUNUO  
plej granda de l' MONDO. Kaj estas samvoja  
kaj glora la ARTO de nia Statuo.

Pro ĉio, Hispano sin sentas tre ĝoja !

Reflektoj metalaj de la ceramiko  
ne estas egalaj... Ĉu Diartifiko ?

Pri forĝo de l' fero, metala laboro.  
jen la konsidero : simila la gloro !

*Schak*, grafo germana,  
kun granda kulturo  
pri l' dramo hispana,  
pri literaturo

de nia popolo,  
tre firme asertis  
pri granda la rolo  
ilia. Li spertis.

Esprimas la grafo  
per diroj lojalaj,  
laŭ sia la trafo :  
al dramoj italaj,  
al anglaj, al francaj,  
jam estis influoj  
tutĝuste bonŝancaj,  
jam estis instruoj,

el verkoj tre famaj  
de niaj aŭtoroj,  
el verkoj la dramaj  
tre plenaj de gloroj.

Malnova poemo  
de «Mia la Cido»  
kun glora la temo  
kaj granda la fido.

Mirindaj sen vantoj  
de Florhe Manrike  
la strofoj de l' kantoj.  
Li verkis lirike.

Jen de l' Mezepoko  
*Romancoj* lirikaj,  
teatra la voko  
al verkoj klasikaj.

Kaj Lope de Vega  
fariĝas la patro,  
la plej superega  
de nia Teatro!

De l' sprita Kevedo  
genia, korflama,  
verkara bukedo  
fariĝas mondfama.

Kaj tre romantike  
la Sankta Tereso  
ja verkis mistike  
kun monda sukceso,  
ĉar estis ŝi saĝa,  
kun granda pasio,  
samtempe kuraĝa  
kun bel' kaj gracio.

Kaj jen «DON KIHOTO»,  
plej granda novelo,  
samtempe la moto  
al justa la celo.

Kaj la Poezio,  
laŭ gloroj, ja floras ;

kaj la Komedio  
tutsame ja gloras.  
Ĉu l' Arto Muzika?  
Belega, subtila,  
varia, mistika,  
ravanta, gracila ;  
ho, kiaj bonŝancoj  
kaj ĝojoj al koro  
pro l' kantoj kaj dancoj  
de nia folkloro :  
motiv', melodio,  
tre riĉe varia ;  
de l' kant' poezio  
ĉu estas pasia,  
ĉu gaja, dolora,  
kuraĝa, kontenta,  
funebra, ĉu ĝlora  
supere tre senta.

#### IV

#### ELTROVO DE AMERIKO

Iam Herkules' starigis kvazaŭ tronon  
sur la promontoron *Gibraltar'*,  
tre videblan mirigantan la kolonon,  
kie kuniĝadas Mar' kun Mar'.  
Kaj sur ĝin gravuris Dio fanfara  
kaj fiera vantano la devizon,  
kiu estis longedaŭre tre admona,  
kaj eĉ naskis timon kaj surprizon :  
«De ĉi tie jam neniu preteriru,  
ĉar jen de la Tero certa fino  
ĉe la ombra Atlantika Mar', ne miru,  
laŭ dekretis FORTO de l' DESTINO».  
Sur afrikan la kontraŭan promontoron  
ankaŭ ja la Di' starigis saman  
la kolonon avertantan... ĉu doloron?  
Ili havis tradicion faman !



Sed disfalon de la Dioj vi jam scias,  
kaj potencon grandan de l' Scienco ;  
tial Hom' studadis longe kaj konscias  
per tre firma sia pacienco :  
«Preter l' Atlantika Maro, NOVAN MONDON ;  
la planedon nian, GRANDA SFERO ;  
nu, navigacii tial tutan rondon  
de la sfera globo, de la Tero.»  
Homo planas la vojaĝon sen deteno ;  
diversfoje kaj eĉ diversloke  
ĝin proponas ; bedaŭrinde la ĉagreno  
trafas lin. Lin ridas tute moke  
kunvenanta Doktorar' ĉe Salamanko,  
antaŭ kiu li science planas,  
ĉar la Sciularo jesas pri la manko  
de scienca fundament' ; li vanas.  
Sed, per prava l' argumento aŭ aserto  
Doktoraro tute ne refutas  
kontraŭ la genia fundamenta sperto :  
tre malprave ili nur disputas.  
Kaj ĉagrene, por pravigi sian diron,  
inspirite de genia blovo,  
al la Doktoraro kaŭzas grandan miron,  
demandante : «*Kiel staros ovo?*»  
Ho, ve ! Jen la Doktoraro en konfuzo.  
Dume, do, Kolumbo prave ridas,  
mildfrapetas ovopinton, jen la ruzo :  
Doktorar', staranta, ovon vidas !  
Doktorar' komprenas la Kolumban moken,  
kaj fiere tuje ja koleras...  
De Kolumbo ne atentis pravan vokon ;  
des pli, do, Kolumbo malesperas.  
Kaj Kolumbo senespera, malfeliĉa,  
jam en Monaĥejon sin direktas,  
ĉar malsana, ofendita kaj malriĉa,  
frenezulo tute li aspektas.  
Al monaĥo tre amika li aliras  
serĉi resaniĝon kaj konsolon...

Tre inteligenta la monaĥo diras  
uzi sian la plej altan rolon,  
fari oferegojn, kanti piajn preĝojn,  
ŝpari eĉ neniajn la influojn,  
por konvinki Katolikajn la Gereĝojn,  
klarigante ĉiajn la instruojn...  
Jen rezulto : por ekipi karavelojn,  
la Reĝino klera kaj tre saĝa  
pruntedonis ĉiujn siajn la juvelojn.  
Ho, Elizabeto tre kuraĝa !  
Jen antaŭen ŝipoj kaj ne multenombraj  
navigaciantaj de la maro  
—spite de l' Devizo—tra la ondoj ombraj  
longedaŭre kaj sen tim' al baro,  
ĉar timonon regas de la karaveloj  
tre kuraĝe sperte firmaj manoj,  
kaj manovrojn, sur la mastoj, de la veloj,  
kontraŭ la bloveg' de l' uraganoj...  
Tamen jam laciĝas peze la rigardo  
ĉu en akvon, ĉu en la lazuron ;  
pro ĉi tio, ankaŭ el multuloj l' ardo :  
fine ĉio naskas la teruron,  
kaj dum karaveloj brave fendas ondojn,  
ŝipanaroj bedaŭrinde celas  
tuj returneniri, ili formas rondojn,  
kaj tumulte ili eĉ ribelas.  
Sed kuraĝe, do, Kolumbo ilin petas  
havu paciencon, sindetenon ;  
estas vane, en lin ili ja sin ĵetas,  
sur lin metas pezan la katenon,  
kvankam kavaliroj havis la kuraĝon  
kun li ŝipanaron devalvoki,  
kontraŭstari energie la malsaĝon,  
la ribelon nepre tuj sufoki,  
rehavigi al ŝipanoj la esperon...  
Fine, oni audas kvazaŭ ĥore  
kaj entuziasme krei : «Teron, teron !»  
Kaj kroniĝas l' entrepreno glore !

De l' Gereĝoj Katolikaj dank' al volo  
la plimulto el la NOVA MONDO  
ja sumiĝas al Hispana la Popolo  
laŭ tre granda «Familia Rondo»  
Ĉar CI, per Scienco kaj kuraĝo penis  
trovi vojojn, landojn, jam la horo  
de l' triumfo miriganta fine venis,  
kun ĝi, la plej granda cia gloro!

V

RONDNAVIGACIO DE LA MONDO

Ciaj ŝipoj estis la unuaj  
kiuj faris rondovojojn  
de la 'Ter' tra l' bravaj ondoj bluaj  
de la Mar'. Unuan fojon!

De ĉi tiu l' urbo de l' Kongreso,  
tra la river' Gvadalkiviro,  
estis de l' ŝiparo, kun sukceso  
granda, glora la deiro,

ĉar por la mistera rondvojaĝo  
ja kuniĝis pacienco,  
preparado, fido kaj kuraĝo  
harmonie kun scienco.

Al CI, HISPANUJO, varme kara,  
apartenas tia gloro!...

CI ĉin montris ĉiam malavara  
al ofera la laboro;  
ĉiam, ĉie, CIA KORO  
estis aventura kaj bonfara!

VI

F I N O

De la pinto de la masto aŭ de l' stango  
CIA FLAG' radias laŭ koloro  
de potence vivoforta glora sango  
kaj de disigita riĉa oro;

laŭ koloro de l' zenita brila suno  
kaj de l' ektagiĝo hele klara...  
Ĝi ankoraŭ flirtas glore dum la nuno,  
GLORA HISPANUJO, lando kara ;  
ĉar se CI jam perdis multajn koloniojn,  
tio absolute nun ne gravas,  
ĉar CI naskis multenombrajn la NACIOJN,  
kiujn CIA FLAGO tute ravas !  
Ho CI, HISPANUJO, des pli mi CIN amas  
kaj feliĉon al CI mi deziras,  
ju pli al NACIOJ ĉiuj mi fratflamas  
kaj TUTMONDAN PACON mi sopiras  
per fratiga nia lingvo ESPERANTO,  
kiun uzis mi por tiu ĉi la KANTO !

## KANTO AL VALENCIO

### I

Ho, ci, Valencio !  
Urbo tre amata !  
Mia poezio  
estu delikata,  
kiel iluzio  
de la kor' ŝatata ;  
de la Muza Scio  
estu inspirata ;  
ke eĉ cia ĉio  
de l' kamparo plata,  
kie ambrozio  
estas produktata,  
de mi, figenio,  
estu, do, kantata !

### II

De la urbo la domaro,  
kie gent' labore bruas,  
staras apud de la maro,

kiu rave, bele, bluas,  
kies ondoj pace rulas  
de la suno sub la lumo,  
la maristojn milde lulas,  
dum odoras jodparfumo.

En la blua milda ondo  
bela suno sin spegulas,  
kaj aperas ĝia rondo  
kvazaŭ disko, kiu brulas.

Estas tia maro bela  
de l' artisto la inspiro  
sub arkaĵo blue hela  
de l' ĉielo. Granda miro!

Urbo bela, simpatia,  
ĉe la bordo de l' *Turia*,  
per la ciaj monumentoj,  
multenombrajn ci entenas,  
civilizon de la gentoj  
tute bone ni komprenas ;

urbo de pentristoj famaj,  
sciencistoj kaj poetoj,  
de skulptistoj ankaŭ samaj,  
glore staras siluetoj ;  
ankaŭ urb' de filozofoj,  
pedagogoj tute spertaj ;  
laboristoj de silkŝtofoj  
estis famaj kaj tre lertaj.

Liberecon ci tro amas  
same,, kiel la progreson ;  
cia koro arde flamas  
por atingi la sukceson :

Ha, heroa GERMANIA,  
ribelado valencia !

La Ekspozici' iama,  
sukcesplena, estis fama ;  
ĝia himno, laŭ kompono,  
estas majstra verkodono !

*Bosco kaj Joanes eĉ Durrero,*

kaj *Velázquez*, *Goya* kaj *Ribera*,  
kaj *Pinturicchio* kaj cetero,  
faras la Muzeon tre supera ;  
oni ja koscias Artan Mezepokon,  
de la vidopunkto grava,  
ĉar pentraĵoj artaj en ĝi havas lokon,  
per kolekto riĉa, rava.  
Ĝemajlita briko ha! de Valencio,  
azuleĥo, tutmondŝama  
produktaĵo estas de la industrio  
nesimila kaj ĉiama.

### III

Granda estas la profundo  
ĉe l' vastega cia valo  
de la fruktodona grundo.  
Al popolo, do, regalo!  
De la val' la grandiozo  
estas rava,  
florohava :  
jen siringoj, la mimozo,  
geranioj,  
la lilioj  
kaj dalioj,  
ĉiaj specoj de la rozo ;  
la diantoĵ,  
la jasmeno,  
la lekantoĵ...  
Por ĝardeno  
ĉiaj plantoj.  
De l' ebena vasta valo  
ĝia tero  
estas riĉa : cerealo,  
la vinbero,  
pruno, pizo,  
la melono kaj karoto,  
bona rizo,  
piro, figo, abrikoto ;

la maizo,  
la persiko, la tomato,  
la ĉerizo,  
la migdalo, la granato  
kaj merizo ;  
fazeolo, lento  
faboj kaj la pomoj...  
Kia granda rento,  
valenciaj homoj !

La citronojn kaj oranĝojn  
cia kamp' abunde donas ;  
ili la kolorajn franĝojn  
de la cia flag' proponas,  
flago kies alta rango  
ja devenas, laŭ koloro  
de la strioj, de la oro,  
kiun kune kun la sango  
iam donis, malavara  
kaj herca, cia gento  
por la ĉiam troe kara,  
justa, sendependa sento.

Ĝi estas reĝa laodoro  
ĉarma de l' oranĝofloro ;  
ĝia suko, kuracilo  
por la nerva maltrankvilo.

Ankaŭ suko de l' citrono  
estas por kuraci bono.

Urb' tre industria ;  
estas grava  
terkulturo ĝia,  
plie rava.

Gento valencia  
estas prava  
por fieri  
terkulturon sian eĉ modelo  
konsideri  
sub ĉielo.

Tre praktika sento

de l' unua gento,  
pro la fruktodono  
de la vala grundo,  
donis por blazono  
KORNON de l' ABUNDO  
kun la fulm' de l' DIO  
JUPITERO vera  
--laŭ Mitologio--  
protekt'il' supera ;  
kaj klarigon vi pardonu,  
por plej bona la kompreno  
mitologiaĵon konu :  
en insulo KRETO  
JUPITERO vivis,  
kiam infaneto ;  
li tre bone fartis,  
NIMFOJ MELISEOJ  
lin tre bone vartis :  
ke lin nutris lakto  
freŝa de kaprino  
estas vera fakto,  
mamojn akurate  
sindoneme donis,  
ĉiam delikate,  
tiel malavare  
bela AMALTEO,  
kiel ankaŭ kare.

La dankemo de la DIO  
faris ĝin KONSTELACIO.

Li, pro samo, al la NIMFOJ MELISEAJ  
donis unu el du KORNOJ AMALTEAJ  
produktantan fruktojn, florojn  
jam por ili. Kia riĉo,  
kiu la iliajn korojn,  
do, plenigis el feliĉo !

Estas fulmo Jupitera  
tre indega je respekto  
pro la sia fort' mistera ;



tial ĝia la protekto  
vere estas plej supera.

De l' blazono, la hieroglifo,  
tute klara estas la signifo :

Sub protekto de la Dio  
estas vala fruktodono  
de la riĉa Valencio,  
kiel diras la blazono,  
la blazono primitiva ;  
tial la praktika sento,  
ĉu vi volas la talento  
de la primitiva gento  
estis akra, ne fiktiva.

#### IV

Estas la temperaturo  
tre agrabla kaj konstanta ;  
sen nebuloj la lazuro  
bele blua kaj ravanta.

De l' kamparo tiel riĉa,  
estas inda la klimato ;  
homo sentas sin feliĉa  
meze tiel bona stato,  
meze tia paradizo  
prezentita de la skizo.

Estas gento tre agrabla,  
gaja, sprita, simpatia,  
tre talenta kaj afabla.  
Bela la virin' gracia !

#### V

Esperanta-Postkongreso  
de la KVINA INTERNACIA  
jam okazis kun sukceso  
en la urbo simpatia,  
kaj la MAJSTRO ĝin prezidis  
kun tre granda la kontento,

ĉar I,IN ĝoje kore ridis  
de VALĤNCIANOJ sento.

Urbo de «LA SUN' HISPANA»,  
kie floris ESPERANTO,  
ne eraros mia kanto,  
la reflor' ne estos vana!

### K I O Ŝ I A L M I ?

Estas al mi : ŝia belo,  
celo ;  
amjesanta ŝia diro,  
deziro ;  
ŝia flama la rigardo,  
ardo.

Estas al mi la standardo  
plej alloga kaj plej glora  
ŝia la hararo ora,  
pro la *cel'*, *dezir'* kaj *ardo*.

Ŝia milda diresprimo,  
rimo ;  
sur la lipoj ŝia rido,  
konfido ;  
en okuloj ŝia larmo,  
ĉarmo.

Tial amoplena varmo  
en la mia koro ardas,  
kiam ŝin mi ekrigardas,  
pro la *rim'*, *konfid'* kaj *ĉarmo*.

Al mi ŝia neestimo,  
timo ;  
ebla ŝia la rifuzo,  
ĵaluzo ;  
amneanta ŝia vorto,  
morto!

Al mi estu bona sorto!  
Ami min ne sin detenu ;

ĉar se male, tuj jam venu  
*timo*, la *ĵaluz'* kaj *morto*.

## L A M A J S T R O

En urbo humila,  
sub sceptro de l' caroj,  
dum temp' maltrankvila  
kaj plena de baroj,  
en ligna la domo  
de unu kvartalo,  
naskiĝas jam Homo.  
Ĉu Dia Realo?

Li estas hebreo,  
de l' juda popolo,  
de kiu l' IDEO  
INTERNA laŭ volo  
de ia Supero,  
de LIA L' ORDONO,  
ja regos sur TĜRO  
por ĝia la bono.

Kaj kreskas infano  
humila, bonkora,  
ĉe la uragano  
de l' vivo dolora.

En Bialystok'a  
la Seminario,  
li studas ; sufoka  
la seniluzio  
liu trafas kortuŝe :  
en grandajn batalojn,  
ĉu pugne, ĉu buŝe,  
kaj kiel ŝakalojn,  
luktantaj li vidas  
terure studentojn,  
ĉar ili ne fidas,  
malŝatas ansentojn ;

ĉe lia la koro,  
kaj kaŭze de l' lukto,  
naskiĝas, do, floro,  
plibone ja frukto.

Favorcirkonstanco  
de la familio  
fariĝas bonŝanco  
por li : Varsovio !

Ĉi tien li venas.  
Universitato  
ne lin jam detenas ;  
kontraŭe, la stato  
de granda malamo  
dividas la gentojn ;  
venĝema la flamo  
jam hejtas kortentojn,  
kaj tre reciprokaj  
iliaj malŝatoj  
fariĝas sufokaj  
al sentoj de fratoj.

Li sentas tre naŭze  
al tiuj bataloj ;  
de tio, nu, kaŭze,  
li pensas pri maloj ;  
kaj dume li studas  
pri la Medicino,  
samtempe li trudas  
—pro fakt' de l' Destino,  
kun granda kontento  
profunde ŝatata,  
tirate de l' SENTO  
HOMAM' DELIKATA  
en BONON la penso—  
rimedon jam trovi  
al sia la menso,  
kapablan por povi  
ĉesigi kruelon  
per frata sindono,

renversi BABELON  
por HOMA LA BONO.

Kaj tial li kreas  
la lingvon neŭtralan ;  
li tute obeas  
por tio moralan  
plej altan la devon ;  
li plene sukcesas ;  
li trafas la revon  
kaj multe promesas.

Kaj li grandanima  
elmontras la KREON,  
kaj RONDO INTIMA  
komprenas L' IDEON.

Sed oni avertas  
la patron—doloro!—  
eĉ oni asertas,  
ke fila laboro  
ne havos utilon,  
ke tia la tezo  
faligos la filon  
en granda frenezo.

La patron ĉagreno  
dolores sufokas ;  
kaj tuj, sen deteno,  
la filon li vokas.

La filo humila  
al patro alkuras,  
kaj tute trankvila  
sincere li ĵuras,  
ke lia laboro  
liveras plezurojn  
al lia la koro,  
detruos la murojn,  
la barojn obstinajn  
de inter la GENTOJ,  
liveros senfinajn  
bonaĵojn de l' SENTOJ

HUMANAJ al Mondo,  
kaj for... ambicioj :  
TUTMONDA LA RONDO  
fariĝos NACIOJ !...

Sed patro admonas  
la filon severe,  
la verkon ordonas  
prezenti senpere,  
«ĉar tute malsaĝe  
dum ĉiuj jarcentoj  
batalis sovaĝe  
ĉe l' Mondo la Gentoj,  
ci certe konscios,  
ke tre malfacile  
la Homoj, do, scios  
vivadi trankvile ;  
de nun ci nur studu,  
nenian parolon  
pri tio ni ludu,  
plenumu la volon  
de l' patro, forlasu  
la revon lojalan,  
ke ĝi ne frakasu  
le celon realan».

Verkinto dolore  
la verkon jam donas  
al patro ; angore  
detruon li konas.

Sed, kion detruis  
la patro tre kara ?  
Ha, penso tuj fruis,  
per vido tre klara,  
ĉar la idealo  
fortnestis ĉe l' koro,  
ĝi staras realo  
en lia memoro.

La studojn li finas,  
jam aĝi li povas,

al REVO sin klinas ;  
en MONDON li ŝovas  
la lingvon neŭtralan  
kaj internacian,  
helpantan, egalan,  
belsonan, gracian,  
al ĉiuj Mondanoj,  
por ke sen ĵaluzoj,  
kaj manoj ĉe manoj  
ne restu konfuzoj,  
malamo, suspekto,  
sed tute la malo :  
frateco, respekto,  
tre firma lojalo.

La nomon li kaŝis  
sub la pseŭdonimo,  
ĉum lingvo jam paŝis  
kurage sen timo :

*Doktor' Esperanto*  
la lingvon diskonas ;  
li, manka de vanto,  
la lingvon proponas.

Ĉi tiu sukcesas  
per SENTO LA NOVA,  
kaj ĝi eĉ promesas  
fariĝi tre pova,  
ĉar venas Kongreso  
en urbo la franca  
kaj ĝia sukceso  
fariĝas bonŝanca ;  
unuan la fojon  
vidiĝas l' AFERO,  
montrante la vojon  
al PACO sur TERO :

kunvenas popoloj  
diversaj, kun ŝato  
aŭdiĝas paroloj  
de frato al frato,

laŭ sento tre rekta,  
humana, sindona ;  
kompreno, perfekta ;  
prononco, tre bona.

De tiam la faro  
bonege progresas,  
kaj jaron post jaro  
popoloj kongresas,  
per lingvo vivanta,  
belsona, komuna ;  
popolo multkvanta  
sin montras ja nuna.

Ĉu ĉio lin festas  
dumvive agrable ?  
Kaj ĉiuj ĉu restas  
al li tre afable ?

Nu ; pri li, ni sciu  
tre gravajn ĉagrenojn ;  
ni bone konsciuj,  
ve !, liajn la penojn.

Edziĝi li fruas :  
edzino tre saĝa  
eĉ ĉiam lin skuas  
al SENTO ; kuraĝa  
ŝi estas, eĉ klera,  
homama, humila,  
dum vivo sufera  
sin montras trankvila,  
kaj donas kuraĝon  
al edzo per faroj ;  
liveras ŝi saĝon  
al liaj la baroj.

Li spertas pro manko  
da monaj rimedoj ;  
de kiu ajn flanko  
lin celas la tedoj ;  
sed grande anima  
li firme ja staras



kaj tute sentime  
li faras kaj faras.

Mortinta, klienton  
kortuŝe li vidas,  
kaj sentas li penton :  
li tute ne fidas

pri sia scienco,  
kuraca la arto ;  
kaj lin konscienco  
kulpigas laŭ parto.

Li, tial, decidas  
restudi : la celo,  
Vienon, lin gvidas  
per bona la stelo.

Okulaj malsanoj  
ja trafas kuracon  
per liaj la manoj ;  
per SENTO, la PACON

al koroj li donas,  
kaj ĉie la FAMO  
tutmonda lin kronas  
per benoj kaj amo.

Sed iu perfidas  
la lingvan aferon ;  
la Majstro ja vidas :  
frakasas l' esperon

envio fatala  
de iu markizo,  
amiko rivala,  
per lingva la skizo,  
kompleta kópio  
de lingv' Esperanto.

Neniam envio,  
ĵaluzo kaj vanto,  
je l' fino sukcesas.

Triumfon ni havas ;  
la lingvo progresas ;  
la Mondon ĝi ravas !

Kongres' de Parizo  
ĉagrenon jam lasas  
en koron. Jen krizo!  
Milit' nin frakasas!

Al Majstra spirito,  
al Majstra la koro,  
tutmonda milito  
jam estas doloro  
terure kruela ;  
kaj lia rigardo  
fariĝas malhela,  
kaj koro sen ardo.

Doloro fatale  
mortigas lin fine,  
ĉar Gentoj ŝakale  
batalas obstine.

La Majstron ni vidu  
ja esti MARTIRO!  
la SIENTO nin gvidu  
al LIA SOPIRO ;  
por bono de l' Mondo  
jam staru konseia  
tutmonda la Rondo  
la Rond' Familia!

De l' koro ĉe l' templo,  
sur ora altaro,  
de l' Majstro ekzemplo,  
de l' Majstro la faro,  
restadu eterne ;  
kaj brulu de l' amo  
ĉe l' brusto, interne,  
potenca la flamo!

Ha, Majstro tre kara,  
fidelaj ni restas ;  
la vojo tre klara  
por ĉiuj nun estas.

Ni ĵuras labori  
fidele, senĉese,

por baldaŭ vin glori  
tutplene sukcese.

Per ĉi tiu longa la poemo,  
al Homaro amo tre lojala  
de la Majstro estas mia temo,  
per belsona brila lingv' neŭtrala.

## ĈE LA TOMBO DE LA MAJSTRO

(SONETO)

Al la tombo de la Majstro nin tiris  
amase kortuŝite «Nova Sento».

Alkuris de popoloj ĉiuj Gento,  
ĉar pilgrimon koro ĉies sopiris :

en tombejon, do, ni, ĉiuj, eniris  
dolore, jes ; sed tamen kun kontento  
staradi antaŭ tombo-monumento  
de la Majstro. Pro sentemo ni miris !

Ĉe la tombo, sub la suno plenbrila,  
paroloj aŭdiĝas, kvazaŭ doloro ;  
tamen ĵuras—ĉar la forto subtila

de l' Majstra Spirito estas ja floro  
ĉe la brust' de fidelulo humila—  
neniam laciĝi. horon post horo,

al certa triumfo per la laboro  
sindonema, por fratigo utila,  
ĝis kiam fariĝu nia la gloro,

—kvankan eĉ ni juĝu ĝin ne facila—  
havigi al Mondo PACON, kaj koro  
ĉiam plu batadu tute trankvila !

## ĈE LA HEJMO DE LA MAJSTRO

Kia kore milda ĝojo !  
Lidjo kaj Sofio,  
la filinoj de la Majstro

sen ceremonio  
nin akceptas ĉe la hejmo  
de la patro kara  
per gastemo tre sincera,  
tute malavara ;  
ridetante tute kore  
kun esprimo varma  
de Homaranismo same,  
kiel ankaŭ ĉarma.  
Jen unue lia ĉambro :  
ĉio restas same,  
kiel kiam li laboris  
senripoze, ame,  
grandanime por Homaro.  
Lia bellaboro  
estis lumo al okuloj,  
«Nova Sent'» al koro.  
Li kuracis malsanulojn ;  
jen, do, l' aparatoj.  
Tie Lingv' Internacia  
faris Homojn Fratoj ;  
tie Majstro vivis, mortis ;  
sed ankoraŭ restas  
tie lia la spirito,  
kaj kun ni kunestas.  
Ni alian ĉambron paŝas ;  
memorajojn vidas.  
Ili pruvas ke la Homoj  
je la Lingvo fidas,  
kaj eĉ iuj Registaroj  
ankaŭ : pergamenoj,  
multaj aliaĵoj, pruvas  
tion, eĉ ordenoj.  
Kaj klarigojn de l' filinoj  
ĉiuj kore ŝatas,  
dum ĉe niaj brustoj koroj  
religie batas.  
Kiel fino de l' ekstazo,

kiun ni plenĝuas,  
kiu en tutplena revo  
korojn ĉies skuas,  
la filinoj de la Majstro  
nin regalas ĝoje :  
dum regalo ni deziras  
foje kaj refoje  
vidi nin en Antverpeno  
je l' venonta jaro ;  
ke ĉi tion ne frakasu  
malagrabla baro.  
Sed la temp' rapide pasas,  
ĉio limon havas ;  
ankaŭ nia la kunveno,  
kiu ja nin ravas.  
Adiaŭoj lastaj venas,  
kaj miksiĝas diroj  
emociaj, tre sincere  
koraj, kun sopiroj !

## **ĈE BIALYSTOK**

Trapasas ni stratojn  
de Bialystok,  
kaj estas la sentoj  
al koro sufok'.  
De granda soleno  
en lokon ni venas,  
kaj nian standardon  
tre alten ni tenas.  
Ni antaŭ humila  
el ligno la domo,  
en kiu naskiĝis  
plej granda la Homo,  
silente staradas,  
pensante fervore,  
konscie, humane,

sentante tutkore.  
Publika amaso  
okupas balkonojn,  
fenestrojn, la stratojn...  
kalkulu personojn !  
Ĝi de la tegmentoj  
forigis tegolojn  
loĝantoj, montrante  
la kapojn kaj kolojn  
de sur la deklivoj  
de domaj tegmentoj,  
pro kio montriĝas  
tre strangaj prezentoj,  
por aŭdi kaj vidi  
malkovri tabulon  
granitan, por glori  
eterne BONULON,  
Kreinton de Lingvo,  
por ĉiuj facila ;  
por ĉiuj la deca,  
pli multe utila,  
ol Turo Babela  
konstante fatala ;  
ĝi plene belsona  
samtempe neŭtrala.  
Fariĝas silento :  
aŭdiĝas la laŭdoj  
de l' Moŝta Urbestro ;  
eksplozas aplaŭdoj  
tondregaj, akkrioj,  
samtempe fiindiras  
kaj de sur tabulo  
kurtenon li tiras.  
Silento denove :  
alia parolas ;  
la Sent' en la brustoj  
de ĉiuj jam bolas.  
Jen novaj aplaŭdoj.

Solenon ni finas,  
kaj plenriverence  
la kapojn ni klinas  
en naskiĝodomon.  
Ni sekve eniras  
tra kort' en ŝtuparon,  
kaj tute ni miras,  
pasante al pordo  
de ĉambro humila  
kaj trafas nin forto  
potenca, subtila,  
venante de tie ;  
subite ni haltas ;  
interne de l' brusto  
la koro ja saltas ;  
ni falas genuen  
kaj kvazaŭ ni preĝas...  
Ĉi tie naskiĝis !...  
La Sento jam Reĝas !

## PRI MIAJ BESTOJ

Amenc min pepas  
nia kanari'  
tuj kiam eniras  
en la ĉambron mi ;  
respondas mi kore  
per la fajf' al ĝi.  
Kaj tiu besteto,  
kun tre bela flav'  
en tuta plumaro,  
estas vera rav'  
pro sia belega  
riĉa kantohav'.  
Je sama la tempo,  
same ravas min  
instinkte tre lerta

la kanariin',  
ĝi estis escepto :  
kantis ĝi sen fin'.  
La kanariino  
—mia jen asert'—  
min vokis vespere  
per pepada lert',  
instinkto, talento  
aŭ mirinda spert',  
por ĝin mi kuŝigi  
apud mia lit',  
kaj kiam mi faris  
tion, sen hezit'  
min kisis beketo  
malgraŭ kaĝa spit'.  
Ĝi kisis la lipojn  
miajn per la bek',  
delikate, kaj estis  
kvazaŭ milda lek'.  
Dolori la bestojn  
kia granda pek'!  
Libera ĉe l' ĉambro,  
flugas ĝi, kun bel',  
de loko en lokon,  
laŭ de l' ĝoj' la cel' ;  
sur mia la ŝultro  
trilis al orel'.  
Al kanariino  
tuj fatala sort',  
sur mia la mano  
trafis ĝin la mort'...  
Min vundiŝ profunde  
la dolora fort'.  
De ĝia spirado  
estas nur subtil',  
apenaŭ moviĝas,  
estas jam ne bril'  
de ĝiaj okuloj



lacaj sur pupil' ;  
de ĝia beketo  
jen malfermo, ferm' ;  
de ĝiajflugiloj  
lasta jen la skerm'...  
En mian birdeton  
falis mortosterm' !  
La jaron sekvantan  
fiksis la Destin'  
por la kanario  
estu jam la fin'.  
De mia filino  
mortis ĝi ĉe l' sin' !  
Kaj havis mi katon.  
Ĝia nom' «*Cing-fu*» ;  
vulgara, tre granda,  
bela, milda ; nu,  
amita. Ĝi mortis !  
Nur memoro plu,  
ĉar tiu dum longe  
ĉe la famili'  
restadis paceme  
en la idili'  
brutara, eĉ malgraŭ  
la hundin' «*Lili*»,  
tre nerva, talenta,  
por la musa ĉas',  
ĉar estis ĝi pura  
el ĉi tiu ras',  
tre bela, tre vigla  
ja sen embaras'.  
Ĝi ankaŭ jam mortis ;  
sed dum sia viv',  
ĝi estis por amo  
justa la motiv'.  
Neeble ne ruli  
sur la mortdekliv' !  
Mirinda ja estis

ĝia la lojal'  
al hejmo ; kaj ĉiam  
regis ĝin normal'.  
Konstante, do, estis  
al ĝi la regal'  
sukera, kareso ;  
sed ne kun trouz',  
ĉar mia katino,  
kun tre granda ruz',  
ungfrapus hundinon  
kaŭze de ĵaluz'.  
De mia katino,  
tre mirinda bel'  
pro blankaj-plumbgrizaj  
haroj de la fel'  
belege brilantaj  
kun tre granda hel'.  
Ĝi, kiam senmove  
kuŝas sur divan',  
ĝin oni ja kredas  
esti porcelan'  
mirinde farita  
arte de la man'.  
Mi kredas tre prave  
pri l' inteligent'  
de mia katino,  
same pri la sent' ;  
neniam malbona  
estis al ĝi tent'.  
Verŝajne min kisas ;  
ĝia la miaŭ'  
esprimas tutklare  
anon hodiaŭ,  
kaj se mi forirus,  
estas adiaŭ'.  
Matene kaj nokte,  
saltas ĝi al lit' ;  
kun mi ĝi ludadas,

kun tro da subit'  
ĝi kuras post pajlo,  
saltas sen hezit'.

Ĉu volas ĝi akvon,  
jen, do, ĝia star'  
ĉe pord' de l' dormĉambro  
kun samtempa far' :

miaŭi dolore  
laŭte kaj kun klar' ;  
kaj kiam alkuras  
iu al okaz',

ĝi staras, arkiĝas,  
iras al la baz'  
de l' akva la kruĉo  
de la lavovaz'.

Ĉu volas eniri  
en fermita lok',  
vin tiras alloga  
la miaŭa vok',  
kaj staras kun mano  
al fermiga hok'.

Ĉu flaras manĝaĵon ;  
al ĝi ĝia trot',  
arkiĝo, kaptuŝo,  
ĉia bestdorlot',  
por trafi bongustan  
ion el la pot'.

Dum nokte ĝi dormas  
supren mia Brust',  
ne pikas min ĝiaj  
ungoj sen la rust'.

Tiele ronkadi  
estas ĝia gust'.

Dum vivas ĝi estas  
mia granda ĉarm',  
de mia la koro  
al ĝi amovarm'.

Kaj kiam ĝi mortos  
ve, amara larm'!  
Mi havis ĉevalon  
en la Regiment' ;  
mi savis la bruton  
el la mortotent'.  
Mi savis min tiel  
el terura pent'.  
Mi povis ĝin porti  
kun mi al Marok',  
ĉar oni destinis  
min al tiu lok',  
en kiu de l' morto  
estis la sufok'.  
Tre bela, tre nobla,  
kun tre bona dres',  
tre forta, rapida  
kvazaŭ la ekspres',  
pro kio, do, estis  
al mi la sukces',  
ĉar bonobeema  
ankaŭ al la brid'  
ja estis ĉevalo  
mia, «*Floreced'*»...  
Kaj kvazaŭ mi diris  
al ĝi : «*Ĝis revid' !*»  
Kaj de post la jaroj,  
ja okazis, jen :  
al la Regimento  
estis la reven',  
la mia ; la bruto  
konis min sen pen'.  
Maljuna ĉevalo,  
estas al ci am'  
en mia la koro!  
Per poemo jam  
al mia brutaro  
estu ia fam'.

## OBSTINO KAJ FIDO

Mi estas sur kampo  
de la Pireneo.  
Jen la suprenrampo  
for de la ŝoseo,  
ĉu inter kratagoj  
de loko al loko,  
kaj inter de fagoj  
de roko al roko,  
tra kie ĉu apro  
tre forta, sovaĝa ;  
ĉu ankaŭ la kapro  
hispana, kuraĝa,  
jam kuras, jam saltas,  
tra inter la pinoj,  
kaj lacaj jam haltas  
laŭ nepraj destinoj ;  
mi grimpas, eĉ kaŭras,  
mi saltas, mi glitas...,  
nenion bedaŭras,  
neniel hezitas ;  
mi iras obstine  
venkante la barojn,  
venkante senfine  
danĝerajn penfarojn,  
senĉese al celo,  
sub klara lazuro  
mirinda je belo,  
en plena Naturo...

Mi sidas sur musko  
de roko akuta,  
je l' hor' de l' krepusko  
vespera kaj muta,  
ĉar vento ne fluas,  
la birdoj ne trilas,  
torento ne bruas  
kaj ĉio trankvilas ;

silente la brutoj  
la herbon ja manĝas ;  
apenaŭ la trutoj  
la lokon, do, ŝanĝas  
en lago najbara  
—pro monta la kavo,  
ĉe loko tre kara  
pro ĝia la ravo—  
ĉe l' akvo kristala,  
en ĝia profundo ;  
kaj kuŝas lojala,  
apude min, hundo.

Kunulo ne bojas,  
nur movas la voston,  
ĉar vere ĝi ĝojas  
ĝuante tagposton,  
kun sia rigardo  
en min tre subtile ;  
dum mia korardo  
batadas trankvile,  
ĉar fine mi havas  
tre riĉan kompenson :  
Naturo min ravas  
sentigas ĝi penson...

\*

Konstante mi faras  
laŭ firma deziro.  
Nenio min baras  
sur mia vojiro ;  
okazos tutsame,  
do, kiel mi diris,  
je kiam mi flame  
la monton suriris :  
trans ĉion mi saltos  
al celo savanta ;  
neniel mi haltos,  
jen jeso ne vanta ;  
ĝis kiam atingos

la sankton de l' vivo,  
la flagon mi svingos  
kun branĉ de l' olivo  
kaj verda la stelo,  
sur teron kaj maron,  
tra blu' de l' ĉielo,  
kantante la faron  
al tuja l' Aŭroro  
ĉe nia la Mondo,  
per nia laboro  
al Frata la Rondo!

## VE, MILITO!

«Kio estas la milito?»  
Jen demando akurata  
de humana la spirito  
tre supere delikata.

Militado estas tute  
bedaŭrinda periodo  
disvolviĝadanta brute  
for de ĉia justa kodo:  
jarcentara la konstruo  
de sinsekvaj homaj faroj  
rapidkuras al detruo  
—por milit' ne staras baroj—.

Dum ĝi vivas hom' sovaĝe  
vivpratempon tre barbaran,  
detruante tre malsaĝe,  
senracie, ĉion karan.

Dum ĝi haltas civilizo;  
ordo tute malaperas;  
de l' justeco, vera krizo,  
dum besteco nur koleras.

Ĝi detruas la meralan  
vere progresantan mondon,

kaj starigas pli ŝakalan  
familion, ol homrondon.

Ĝi fortiras de la koro  
ĉian homamantan senton ;  
nur por krimo kaj doloro  
ĝi pretigas, ve !, l' atenton.

Ĝi, reĝino kvazaŭ, tiras  
sekvantaron tre kruelan,  
kiu tre profunde ŝiras  
koron je homam' fidelan.

Ĉu la sekvantaro? Jeno :  
tre terura la malsato,  
kaj por ĉio la forpreno ;  
al buĉado granda ŝato ;

la blasfemo ĉe la lango,  
kaj freneza granda ĝojo  
kiam trempas homa sango  
fortajn botojn sur la vojo ;

pesto, rabo kaj delogo,  
trompo, cindroj kaj ruino,  
kunmiksita ĉe mondtrogo  
kaj kovrite, je la fino,

per mantelo de la famo,  
dum lumigas tutan teron  
de l' brulado ruĝa flamo  
disiganta senesperon !

For milita senmoralo !  
Ĉiam kontraŭ ĝi batalu ;  
ne nin trenu la Fatalo !  
La Milit' por ĉiam falu !

## R E S P O N D U

Bela, ho !, fraŭlino  
plena de la ĉarmo,  
diru : ĉu kun varmo  
amis vi, feino ?

Ne plu mi jam sentu



koron maltrankvila ;  
amu min, konsentu,  
ho fraŭlin' gracila !

Ke mi baldaŭ aŭdu  
vian aman jeson,  
kaj Amoro laŭdu  
novan la sukceson.

Male : se rifuzon  
viaj lipoj dirus,  
mian koron ŝirus  
vi ; en korkonfuzon  
kaj frenezĵaluzon  
neo ja min tirus !

### **KIAL ŜI RUĜIGIS?**

«Venas de la akv' al aŭdo  
ritma kaj konstanta plaŭdo,  
ĉar, de ĉie, ĉe la montoj,  
fluas akvo de la fontoj,  
kies milda la murmuro  
estas al la kor' plezuro.

De la montoj suprojn kronas  
neĝokampoj, kaj imponas  
de l' supraĵoj brila blanko  
de la val' en ĉiu flanko ;  
male, verdaj la deklivoj,  
kun belegaj perspektivoj,  
la turistojn, do, stimulas ;  
kaj la ĝojo ilin lulas.

Sed aŭdiĝas granda bruo,  
kaj naskiĝas kora skuo,  
ĉar okazas neĝdefalo  
de la supro de la valo ;  
kiel sekvo de l' lavango,  
tuj ruĝiĝas iu vango...»

.....

Mi demandis : «Kia kaŭzo?»  
Sekvis poste longa paŭzo :

«Ĉu ruĝiĝis ŝi pro iu?»,  
mi demandis ; do, mi sciu :

«Pro danĝero ŝi sopiris  
ĉu al iu?...» Mi min diris.

«Ĉu ŝi vidis en doloron  
jam falinta sian koron,  
kiun ĵus bruligis flamo  
de pasie arda l' amo?...»

... ..

Tempo veron al ni donis  
pri ruĝiĝ' pro neĝdefalo  
okazinta en la valo ;  
la kialon jam ni konis,  
ĉar ĵus kapon ŝian kronis  
de la edziniĝ' vualo  
ornamita per konvalo.

## ĈE LA ARAGONA PIRENEO

De l' montaro bela loko  
ĉe piedo de altano ;  
tute kruda la fontano  
konstruita ĉe la roko.

Firme staras granda koko  
sur tegmento de kabano ;  
bonodoras timiano ;  
venas de ŝafist' l' alvoko.

Tie kreskas la jasmeno,  
la lilio, la lekanto  
la levkojo, rosmareno,  
eĉ la rozo kaj dianto...

Paradizo, ĉu edeno?  
Ĉarma loko por revanto!

Ha ! Ĉe tia la Naturo,  
inter pinoj, inter floroj,

en nin venas ventmurmuro ;  
kaj al korpoj kaj al koroj  
estas ĉio ja plezuro :  
ni nin sentas sen doloroj !

## JE ŜIA NOMFESTO

«Ne forgesu la nomfeston  
mian. Certe vi komprenos ;  
mi deziras. Jes, vi venos ;  
mi esperas la ĉeeston.»

Tagon tiel leterdiris  
vi al mi. Mi ne forgesis ;  
koron mian dir' karesis  
kaj profunde mi sopiris.

Ĝojas ĝojo la ĉeesto :  
mi tutkore vin gratulis ;  
senton mia koro lulis  
dum la nia apudesto.

Tiun senton por esprimi,  
mi decidis tujan agon ;  
ha, la feliĉegan tagon !  
Jes, antaŭen ! Kial timi ?

En vendejo tuj mi mendis  
korbon da tre belkoloraj  
floroj ; kun esprimoj koraj,  
ilin al vi mi jam sendis.

Ĉu vi sentis la kontenton  
pro la faro, mi ne scias ;  
sed mi tamen opinias,  
ke vi ĝuis la prezenton.

Nur estimo via restas  
al mi ; estas ĝi sufiĉa  
al la koro sentoriĉa  
tia, kia mia estas.

La feliĉaj tagoj pasis !  
Ju pli rava la kunesto,

des pli mala la foresto :  
en doloro ĝi min lasis !

Des pli granda la doloro !  
Senton devas mi sufoki,  
mi ne devas vin alvoki  
spite de dezir' de l' koro.

Se mi estus ja kuraĝa,  
povus ion mi vin sendi ;  
sed vi rajtus prave plendi,  
ĉar mi estus, do, malsaĝa.

Nu ; malgaja mi min sentas  
pro situacio mia ;  
tamen, tre korambicia  
sento min senĉese tentas,  
min instigas al la ago,  
kiun vi tuj malpermesis,  
kiam senton mi konfesis...  
Ha, neforgesebla tago !

Ne esperu, ne, la penton ;  
kvankam akra la doloro,  
ne sufokas mia koro  
sian grandan puran senton.

Kion sendi, do, hodiaŭ ?  
Nu ; «Feliĉojn» nur mi diras,  
dum la kor' dolorsopiras,  
ĉar vi diris jam «Adiaŭ !»

Venu via la admono.  
Mi trankvile ĝin atendos,  
kvankam vi certege plendos,  
ankaŭ venos la pardono,  
ĉar vi estas grandanima  
kaj vi devas, do, kompreni :  
mi ne povas min deteni  
pro la mia sent' senlima !

Sed, jes, havas mi detenon :  
mian koron eĉ oferi,  
kaj ne plu al ĝi toleri  
rompi ĝian la katenon.

Tre malgajaj la sopiroj  
estas de la koro mia !  
Brunulin' tre simpatia,  
tiaj ankaŭ miaj diroj !

### A M P E R F I D O

Ĉar amanto jam foriras,  
ho, ve !  
li min lasas tute sola ;  
nur de tiam tro sopiras,  
ho, ve !  
mia koro senkonsola !...  
Sorto kia  
estas mia ? !  
Ĝestas tia,  
ja, fatala  
faro lia !  
Nelojala,  
ambicia,  
kor' perfida, nemorala !  
La amato ĵus foriris,  
ho, ve !  
kaj min lasis senespera,  
kiam pri edziĝ' li diris.  
Ho, ve !  
Min atendas sort' infera !  
Amo lia  
estis kia  
al la mia ? !  
Fi, mizero  
sole lia !  
Ĉu sufero  
de alia  
estas sama ĉe l' infero ?

## SOLA JESO BELA

Jaca (1) urbo tre amata!  
Al la kor' pasia  
via la «kamparo plata» (2),  
plene tradicia,  
estis simpatia  
al mi, kiam de l' spirito  
la konscio mia  
jam pri l' am' fariĝis mito!...  
Ankaŭ eĉ fariĝis mito  
la Justeco, ĉio!...  
Sed al koro restis rito  
de la iluzio...  
Koro! Iluzio!  
Iluzio min subtenis.  
Mia fantazio  
sopirade penis, penis...  
Tre avide mi, do, penis  
igi la ĉagrenojn,  
kiuj longe min katenis,  
dolĉaj, same penojn.  
Dolĉaj igi penojn!...  
Jaca, via la Naturo  
rompis la katenojn!  
Kia mia la plezuro!  
Kiel granda la plezuro!  
Ŝajnas, ke ja diras  
de l' montaro la konturo:  
«Kial vi sopiras?  
Dum vi nur sopiras,  
jam, al Mond' veninte, FORTO  
la Homaron tiras  
al pli plenfeliĉa SORTO.

---

(1) Elparolu Ĥaka.

(2) Tiel oni alnomas la kamparon sur kiu ĝi staras.

Do vi tuj eliru  
de ŝajnanta vivomorto.  
Jam ne vi sopiru!  
Plu ne jam sopiru  
—Cu forgeso? via koro!  
Ankaŭ vi ne miru.  
For, for de vi la doloro;  
ne plu, for, for la doloro,  
ankaŭ ĉiaj timoj.  
Lumo brila, kiel oro,  
en la tutaj limoj,  
supren ĉiuj limoj,  
jam aperis: «*Forta voko*»  
sonas kun esprimoj  
gajaj; por la amo loko...»  
«Cu por amo estas loko?»  
—Mi vin interrompas —  
Cu ne kor' fariĝis roko?...  
Cu, do, vi min trompas?  
Kial vi min trompas?  
Nigrajn malesperojn miajn  
ĉu vi eble rompas?...»  
«Vi haltigu dirojn viajn!  
Mi haltigas dirojn viajn,  
ĉar ne estas saĝa,  
kiu diras aĵojn tiajn.  
Ve, vi, maturaĝa!  
Homo maturaĝa  
ne, do, rajtas jam sin senti  
tiel malkuraĝa,  
ĉar li nepre devos penti;  
jes, li nepre devos penti  
pro la malespero,  
senkulpigojn eĉ silenti.  
Ofte la sufero,  
granda la sufero,  
des pli granda bono estas,  
kaj de ĝi, sur tero,

tre abundaj fruktoj restas.  
Eĉ de amdoloro restas,  
sur la ĝiaj ruboj,  
tre agrabla dolĉa sento,  
kiam pasis nuboj,  
—ho, kruelaj nuboj,  
nigraj nuboj de l' turmento!—  
kaj ĝin tuj, sen duboj,  
oni turnas al la ĝento,  
veran amon al la ĝento.  
Kiom da plezuro!

Jam predikas homa famo,  
suben la lazuro,  
hela la lazuro,  
ne persistos la malamo!  
For la Babel-Turo!

Jam kuracas vin balzamo!  
De la vivo la balzamo  
estas Esperanto!  
Vi trairu tutan Mondon.  
Homojn ligas Kanto;  
La Espero-Kanto  
faras «*familian rondon*!»  
For la homa vanto,  
kiu baras tiun Fondon!»

.....  
Mi vojaĝis en la Fondon.  
Ha, la koro mia  
multe ĝojis dum Kongreso  
bela, dum Dek-tria.  
Plene al Dek-tria  
estis granda la sukceso,  
ĉar la «*sento nova*»,  
la eterne pova,  
estas SOLA BELA JESO!



## KANTO DE AMANTO

Junulino bela !  
estas mia kanto  
tiu de amanto  
al vi jam fidela.

De l' liuto mia  
estu la sonoro  
al la via koro  
dolĉe simpatia.

Mia kanto revas  
vian grandanimon ;  
mia voĉ' esprimon  
koran al vi levas :  
sub la klara luno,  
ĝis la birdo trilu,  
via belo brilu  
pli, ol brilas suno ;  
brilu via belo,  
je ĉi tiu horo,  
por la mia koro  
kvazaŭ norda stelo.

Koro mia penas  
trafi vian amon ;  
havi la balzamon,  
kiu de vi venas.

Ĉar—ha, mia Dio!—  
via sento ama  
al la mia flama  
estos ambrozio.

Mi vin ambicias  
kore kaj senĉese ;  
tion diru jese,  
kion vi jam scias.

Ne prokrastu dirojn,  
mi petegas tion...  
Ŝatu iluzion !  
Aŭdu la sopirojn !

Belulin' gracia,  
dir' de via buŝo  
estos rava tuŝo  
por la koro mia ;  
ĉar de l' kant' la forto  
estas jam angora,  
ne vi plu senkora  
estu, kiel Morto !...  
Vi rimarku tonon  
de la mia kanto...  
Via la amanto  
donos al vi tronon !

### **A L V O K O** (1)

Karuloj sentemaj,  
aŭskultu la dirojn ;  
de rusa la Gento  
atentu sopirojn :  
Infano malsata  
plore gas angore ;  
amanta patrino  
suferas dolore ;  
por kara la filo  
ne havas ŝi nutron,  
ĉar brusto, la ŝia,  
nur havas jam putron.

Terura momento !  
Ŝi vidas de l' filo  
la morton baldaŭa  
sur lia pupilo.  
De l' knabo malgrasa  
ne tenas la mano  
tremema, senforta,  
peceton el pano.  
Junulo malforta

---

(1) Okaze de la Volga katastrofo mi ĝin verkis.

en plankon, jen, kuŝas ;  
la Morto tragika  
lin akre ektuŝas.

Forrabis malsato  
mortiga, kruela,  
la viajn vangrozojn,  
knabino tre bela !

De l' Volga Popolo  
la viv' aktuala  
martiro ja estas  
pro kaŭzo fatala.

La gentoj ankoraŭ  
heroe rezistas...

Ĉu en ni, Homaro,  
kompato ekzistas ?

Alkuru ni, ĉiuj,  
kun nia l' almozo,  
ĉar estas Bonfaro  
plej bela la rozo.

Homaro rapide  
praktiku fratamon,  
al rusa la Gento  
ni portu balzamon ;  
balzamon efikan,  
balzamon de l' vivo,  
por tion alporti  
jam estas motivo.

## JEN SORTO MIZERA

Nubaro kolera  
ja naskas las fulmon  
hakontan la ulmon  
per forto mistera.

La fulmoj de l' nuboj  
bruligas arbaron,  
renversas remparon  
kaj restas nur ruboj.

La fulmo, en maron,  
montriĝas kruela,  
al ŝipo la vela  
forigas mastaron.

Kaj la uragano  
timige ekblovas,  
la ŝipon ĝi ŝovas  
tra la Oceano.

De l' vento la forto  
fariĝas sovaĝa...  
Maristo kuraĝa!...  
Ve! Kia la sorto?!

Ventega la bleko,  
de l' tondro la bruo,  
de l' masto la skuo,  
kaj krak' de l' ferdeko...

Rulante, la ondoj,  
kun ŝaŭma la krono,  
ĉirkaŭen timono,  
formiĝas je rondoj ;

multope rulante,  
la ŝipon atakas,  
ĉi tiu jam krakas  
bruege, ĝemante ;

kaj ŝipon senĉese,  
post unu aliaj,  
frenezambiciaj,  
mortfrapas karese.

Krakegoj la finaj  
terure, ve!, sonas ;  
la ŝipon jam kronas  
la ondoj obstinaj ;

ĉi tiuj fieraj  
la ŝipon englutas,  
restaĵojn alŝutas  
al altoj eteraj.

La maro kolera

detruis la ŝipon...  
Ve, vidu nur ŝtipon!...  
JEN SORTO MIZERA!

### ESPERO

Vesperon someran,  
mi kuŝas sur herbo ;  
trankvile la cerbo  
ricevas la teran  
influon misteran,  
kaj inter folioj  
kaj inter la floroj  
alvenas radioj  
de l' suno, odoroj  
de freŝaj lilioj.

Kuŝiĝas la suno.  
Venteto ne blovas.  
Leviĝas la luno.  
Trankvilon mi trovas.  
Pensadi mi povas.

Al tio invitas  
eĉ sono de l' turo,  
venante ; naturo  
majesta incitas  
min... sub la lazuro ;

ĝi min enpensigas  
pri frata pacamo ;  
ja ĝi min instigas,  
ja ĝi min bruligas  
per arda la flamo.

Libere rivero  
sur tero, ja, fluas ;  
humila pasero  
liberon tro ĝuas.  
Ĉu homo sur tero?...  
Sur tera la krusto,

la homo mizera,  
pro sorto infera,  
sin sentas kolera  
interne de l' brusto ;  
ŝakalo sin sentas,  
pri krimo ne pentas ;  
pri granda doloro  
neniam atentas,  
kaj jes nur pri oro.

Ĉu ne nin edifos?...  
Ĉu nur pro malbono  
kor' estos la trono,  
kaj nin ne modifos  
de l' virto la kono?

Se estis milito  
ĝis nun por ni rito ;  
de nun jam nur amo,  
kun hela la flamo,  
fariĝu spirito

de novaj la jaroj  
por Mondo feliĉaj ;  
ke niaj la faroj  
ne estu fetiĉaj  
sur teroj kaj maroj,

kaj mano ĉe mano  
ni kantu laŭ ĥoro,  
kun ĝojo en koro,  
alvenis la horo  
por nia resano.

## K O N T R A Ŭ A J O J

Je pasinta jaro,  
mi vojaĝis tra Eŭropo  
al fratiga faro ;  
je ĉi tiuj tagoj,  
dum vojaĝo, min kortuŝis  
esperantaj agoj.

Ho, ve! Dum ĉi tiu  
ankaŭ mi vojaĝadas...  
Bedaŭrinde, sciu :  
Dum la suno spikojn  
maturigas, mi faradas  
ve!, militpraktikojn ;  
ion mi praktikas  
—ĉar mi estas nun soldato—,  
kio nur efikas  
al kruela rito  
ĉiam hombuĉanta fratojn  
je trompanta mito,  
kies homa tasko  
estas, jes, abomeninda ;  
ĝi, ve!, estas masko  
ruza de friponoj  
tre obstinaj, ĉiam pretaj  
vivi por malbonoj.  
Kiel, ho!, skandala,  
de ĉi tiu rito, estas  
diro senmorala :  
«Vi por la milito  
vin preparu diras ĉiam  
Marsa la spirito—  
se vi pacon volas»,  
dum en koroj de friponoj  
ambicioj bolas.  
Dum tion mi faras  
«diligenta kolegaro»  
ĝoje sin preparas  
al tutmonda rondo  
starigonta firman pacon  
sur la tuta mondo.  
Armilaro kuŝu  
jam por ĉiam! «*Nova sento*»  
nin antaŭenpuŝu!

## KIALO PRI PREFERO

Kial ĉiam mi preferas  
por rajdadi la ŝoseon  
kiu iras Pireneon?  
Ĉar fidema, mi esperas!...

Ĉu la nobla bruto paŝas,  
ĉu galopas la ĉevalo,  
ĉu ĝi trotas tra la valo,  
la montar' la limon kaŝas;  
paŝo, troto kaj galopo,  
de la nobla mia bruto,  
portas min laŭ longa kruto;  
mi pensadas pri Eŭropo...

Mi pensadas pri la Mondo,  
kie restas malkontento:  
kiam venos la konsento  
pri la «familia rondo»?

La ĉeval' trankvile iras  
tra la bele rava valo.  
dum mi revas: «Idealo  
savu nin!... Ĉu mi sopiras?»

La brueto de la vento  
al mi sopirado ŝajnas...  
Ni apenaŭ ion gajnas  
por tutmonda frata sento!

De la birdo bela kanto  
al mi sopirado estas;  
dum la koro firme restas  
ĉe la brust' de pacamanto.

Ankaŭ estas tre simila  
la murmuro de la fonto,  
ĝia falo de la monto  
estas sopirad' subtila;  
sopiradi al la hundo  
fojojn aŭdas mi de l' vojo  
per la ĝia laŭta bojo



alvenanta de l' valfundo ;  
kaj la akvo de l' rivero,  
kiu en fluejo saltas,  
eĉ en iuj lokoj haltas  
por sopiri... Ĉu ne vero?

Kaj eĉ estas la sonoro,  
alvenante de la turo,  
kiu staras ĉe l' konturo,  
sopirado pro doloro ;  
eĉ la grinco de l' cikado  
sur la branĉ' de akacio  
estas al la fantazio  
longedaŭra sopirado.

Tiel same mi, do, diras  
pri la monotona trilo  
de l' humila gaja grilo :  
ankaŭ grilo ja sopiras !...

Sajnas ke pro la ĉagreno,  
orumita bela spiko  
de bonfara la tritiko  
jam kliniĝas eĉ kun peno,  
jam kliniĝas kun doloro,  
rimarkante ke Homaro  
ne atentis pri Bonfaro  
ne atentis pri Honoro ;  
ĉar se ĝi fariĝus pano,  
la bongusta peco ĝia,  
ĝia peco ambrozia,  
ne alvenus ĉies mano.

... ..  
... ..

Kvazaŭ bona kamarado,  
per sincera granda saĝo,  
min parolas la pejzaĝo  
dum la tuta promenado ;  
kaj pro tio mi preferas  
por rajdadi la ŝoseon  
kiu iras Pireneon,

ĉar aliri mi esperas  
al tutmonda la kunveno,  
kiu homojn jam kunigos,  
kiu homojn jam instigos  
al fratiga entrepreno ;  
ĉar potenca SENTO NOVA,  
kiu venis al la MONDO,  
min altiras al la RONDO,  
kiu estos la plej pova ;  
kaj jam preter Pireneo,  
ĉar mi estas pacamanto,  
min altiras ESPERANTO  
per INTERNA LA IDEO.

## NE TIMU

Li kvankam trairos  
provincon Jaen'on,  
li havos detenon,  
li nure sopiros ;  
de lia la buŝo  
nur flugos esprimo...  
Por ŝi, do, ne timo...  
Nur estos kortuŝo !  
Si estu ja certa,  
ke regos li koron,  
sufokos doloron,  
ĉar estas li sperta,  
kaj estos lojala  
je ŝia l' ordono  
por ambaŭ ja bono.  
Ve, sorto fatala !  
Ĉar lia Destino  
lin metis hazarde  
en senton, tre arde,  
al rava feino ;  
sed havis ŝi saĝon,

je tago sunhela  
al li tre kruela,  
por regi kuraĝon  
de homo mizera,  
ĉar koro, la lia,  
je am' ambicia,  
ne estis libera.

Al homo prudenta,  
fidela je amo,  
jam estas balzamo  
ŝin juĝi kontenta ;  
sed ĉiam am' nestos  
tre milde, trankvile,  
ĉe l' koro ; subtile  
al ŝi ĝi alestos  
per ago nur pensa,  
dum granda sufero,  
pro la senespero,  
fariĝas intensa  
por li sur la tero.

## N O K T A D E J O R O

Pro mia deĵoro,  
jen mi ĉe tendaro,  
je vigla nokthoro  
pre maŭra najbaro.

Ni unu la alian  
atentas ŝakale  
por fari la nian  
mortpafon. Fatale!...

Terura malhelo.  
Nenio ja bruas.  
Sur mia mantelo  
la roso eĉ fluas.

Ne blovas la vento.  
Soldato atentas  
ĉe plena silento

ĉu maŭr' sin prezentas ;  
atentas kvieta  
en sia posteno,  
por pafi jam preta  
sen ia deteno,  
ĉar fojojn multnombrajn  
profitas la maŭro  
la noktojn tre ombrajn,  
kaj estis bedaŭro :

Nokt' estas serena.  
Mi tenas pistolon...  
Por kio konvena ?  
Plenumas ĝi rolon...

Ke ĝi ne funkciu !...  
Hazarde ĝi pafas !...  
Feliĉe vi sciu :  
neniun mi trafas.

Matena la helo  
la ombrojn forskuas ;  
finiĝas la celo ;  
soldato jam bruas.

La helo en korojn  
jam naskas trankvilon,  
ĉesigas angorojn,  
malŝargas pafilon...

Silentis li veojn,  
detenis malĝojojn,  
dum gardis tranĉeojn.  
Kaj tiel... multfojojn !

Kontenta soldato  
revenas al tendo ;  
aŭdiĝas kantato  
anstataŭ la plendo.

Ĉu ni grandanimaj ?  
Ve ! Kial batali  
dum jaroj senlimaj ?  
Evidu ni fali  
en agoj tre krimaj !

## AL VIENO TRA L' DANUBO

Al Kongreso, al Vieno,  
ni vojaĝas tra l' Danubo  
sur la ŝipo ; kun deteno  
de la pluv' de densa nuboj ;  
se ĝi falus ; jen, ĉagreno !

Ĝisesperanta Karavano  
nun vojaĝas al la celo  
kor' ĉe koro, man' ĉe mano,  
altirate de la helo  
de la nia verda stelo.

Nin ĝojigas panoramo.  
Al tutmonda granda festo  
ni vojaĝas en fratamo ;  
estas nia koro nesto  
de la sento de l' pacamo.

Dum de l' sun' la brila oro  
la nubaron jam ekŝiras,  
kaj rapide nia koro  
tre ĝojige, do, sopiras,  
ĉar alvenos baldaŭ horo,

kiam en fratiga RONDO  
pacon, amon, ni tre ĝuos ;  
kiam ĜISPERANTA MONDO  
tute frate ĉiam bruos  
kaj la ĝojo korojn skuos.

## DE VIENO

Ĉies hejmoj nin altrenas  
ĉar ni finis la Kongreson ;  
sed domaĝe... min detenas  
priparoli la sukceson !...  
Certe, bone vi komprenas.

Al la «rondo familia»  
mankis je ĉi tiu fojo...

kion havis je alia,  
tiu bruetanta ĝojo,  
ankaŭ frata, simpatia.

Malgraŭ tio, ĉe l' intimo,  
mi ĝuadis la kontenton,  
ĉar nin regis altestimo  
produktanta noblan senton  
per sincera koresprimo.

De l' disiĝo la momento,  
ĉe l' agrabla rondo tia,  
estis ne la komplimento,  
estis io tro alia,  
estis ZAMENHOFA SENTO ;

Kvazaŭ kaptus nin malsano,  
diris unu la aliajn  
ĉies mano ĉe la mano :  
«Ĝis revido !»... kaj la niajn  
sentojn korajn... «Karavano !»

«La Kongreso !»... Iujn dirojn  
niaj lipoj kvazaŭ ŝutas :  
«Fartu bone !»... «Bondezirojn !»...  
Kaj ni miksas, dum balbutas,  
kun paroloj la sopirojn !...

## AL LA DEKKVINA

Mi ne povas ĝin viziti  
ĉar kruela la Perforto,  
en ĉi tiu kamp' de l' Morto,  
tenas min ve ! por militi.

Dume vi en paco ĝuas  
la kuniĝon de la fratoj ;  
male mi, malbonaj tratoj  
mian fratan senton skuas.

Al mi diras tondra sono  
de l' armiloj la teruron ;  
al vi diras la plezuron  
de l' Espero milda tono,

kiu certe ĝis mi venos  
tra la spacoj, per la ondoj ;  
ĝi traflugos tra la mondoj,  
ĉiuj koroj ĝin komprenos.

Tiam homo ne ŝakalo  
por la similulo estos,  
bonkoruloj nur ni restos,  
ter' ne estos plu plorvalo.

Ni laboru, do, senĉese  
por atingi venkon finan ;  
esperantisman doktrinan  
ni akcelu plej sukcese.  
Mi salutas la DEKKVINAN !

## AL TRINIDAD SORIANO

Jam en Barcelono,  
juna li studento,  
kaptis lin la sento  
pri la homa bono  
al fratec' egala ;  
al ĝi faris kulton,  
al ĝi donis multon,  
per agad' lojala  
la studento saĝa,  
la junulo lerta ;  
same faris sperta  
li jam maturaĝa.

Ligis nin ideo,  
ligis nin la sento ;  
iris ni al gento  
sur mem la ŝoseo ;  
pro la lia aĝo,  
estis li la sperto ;  
al triumfa certo,  
estis mi kuraĝo.

Kune ni laboris

pleninterkonsente,  
ĉiam diligente :  
ESPERANTO floris !

Ho, ve ! Horo venis...  
Vidis vi la Morton ;  
venki ĝian forton  
vane vi jam penis.

Sola mi, do, restas !  
Multe mi vin ploras ;  
tamen mi laboras  
malgraŭ vi forestas.

Restas ĉe la koro,  
pri vi dum la vivo,  
vigla la motivo,  
dolĉa rememoro,

kiu min ja gvidas  
ĉiam al la celo,  
dum vi en ĉielo  
por eterne sidas.

### MEMORAĴO

Ve, amiko kara, malfeliĉa !  
Jarojn mi ploradas vian morton ;  
por bedaŭri vian malbonsorton  
estas la parolo nesufiĉa !

Bela esprimanta la parolo  
al mi por la rememoro mankas.  
La Destinon kore mi maldankas !  
Kial malsukcesas mia volo ?

Nun ne havas mia fantazio  
verbon ĉu por kant' aŭ sola diro  
pri la kara nia pioniro  
de l' Afero en Andaluzio.

Kara, ve, Trinidad Soriano !  
Jes, ankoraŭ daŭras la angoro,  
kiun kaŭzis al mi la doloro  
pro la via mort', samideano !



Eĉ en mia mano tremas plumo,  
mi tre malfacile ĝin subtenas ;  
cerb' ideojn pensi vane penas,  
ili tuj disiĝas kvazaŭ fumo.

Celi skribi ilin sur papero  
ja rezultas esti eĉ himero.

Jen mi tutplene nekapabla...  
La dolore estas malfabla !

## KVAZAŬ PREGO

AL RICARDO CODORNIU

Se vi iam al la kampo irus,  
kie arboj kreskas foliplene,  
kaj se vi vin sentus senĉagrene  
kaj revante —kiel mi dezirus— ;  
vi jam aŭdus, kiel se sopirus  
iu dolĉe, milde eĉ bonvene.

SCIU :

De Ricardo Codorniu,  
jes, de lia la animo  
dolĉa, milda esprimo  
estus ĝi, kaj ne sopiro  
de l' fervora Homamanto  
kaj fidela Pioniro  
de la lingvo Eŝperanto.

La murmure de la vento tra l' folioj,  
kantoj de la birdoj ; de la akvo, plaŭdo  
ĉe la rokfluejoj, estas harmonioj  
grandiozaj kaj entuziasma laŭdo

pri la vivo de l' inĝeniero fama,  
kiu, familien, estis ja modelo ;  
por la «Kolegaro», nobla kaj homama,  
preta ĉiam por hompliboniga celo.

Homoj, birdoj, arboj kaj la plantoj,  
bonon ŝuldas lin ;  
kaj dankemaj, kvazaŭ preĝoj, estu kantoj,  
ĉar jam lin forportis la Destin'.

## AL RAFAEL DE SAN MILLAN

Jam mortis Rafael de San Millán,  
poeto nobla plena de l' inspir',  
talenta grandanima kavalir'!  
Per plumo esprimadis lia man'  
la sentoj, kiuj fluis de fontan'  
tre milda, de la koro; lia dir'  
alloga ĉiam estis, kaj dezir'  
bonkora kontraŭ ĉia la tiran'...  
Li estis inda je plej bona sort',  
ĉar estis tre sindona lia sent'  
al ĉio kaj al ĉiuj; eĉ la fort'  
de tia sento estis fundament'  
por lia la konduto ĝis la mort';  
nek estis por malbon' al li moment'.

\*

De lingv' Esperanto per belo  
vi verkis; mirinde kantinte  
laŭ versoj tre plenaj de helo  
verkitaj de kvazaŭ anĝelo  
al tero memvole veninte.

Ni iris Kongreson; ĝojante  
sur sama la vojo al celo;  
ni ĉiam laboris, konstante,  
ĝis morto vin ĵiris—triumfante,  
por nia bedaŭr'—el terŝelo.

Dumvive, animaj suferoj  
ne trafis estingi la flamon  
ĉe via la brusto, nek amon,  
la vian, sufoki mizeroj.  
Vi havis animan balzamon  
ĉe l' mezo de teraj inferoj,  
la Kantojn al Belaj Esperoj,  
kaj certe vi havos la famon  
ĉar ema vi estis al Vereoj,  
kaj ĉiam vi celis Fratamon.

## AL CHRISTENSEN

Ha Christensen, kore tre amata ;  
nia tre ŝatata granda amiko,  
estu nia ago delikata  
al vi filo de Nordameriko.

Sub la suno bela helradia,  
kun plenplena ĉarma brila helo,  
tute sama estu al vi nia  
la hispana frata verda stelo.

De Hispana nia l' Asocio  
ni vin nomas membro tre honora  
sur la tero de Andaluzio :  
al vi nia frata sent' tutkora !

## KIAM MI RAJDAS

(ROMANCO)

Mi al la kamparo rajdas,  
kiam sun' subiri finas ;  
kiam birdoj petolemaj  
ŝajnas ke jam korsopiras,  
tial ke enamiĝadon,  
ve !, haltigi ja devigas  
tuj al ili malheleco  
nokta, kiun ili timas,  
tion !, ke, je la krepusko,  
en la nestojn rifuĝiĝas ;  
kiam muŝoj kruelecon  
perdas, pacon jam akiras,  
kaj noblegan mian bruton  
furioze plu ne pikas,  
ĉar la varmo de la suno  
ilin, do, ne plu ekscitas ;  
kiam belan la trankvilon  
la Naturo ekakiras,

kaj ĝi ĉiam amantena,  
malavara, eĉ invitas  
nin al la plej dolĉa ĝuo,  
kiun kanti mi ne scias ;  
kiam tre avide pulmoj  
puran la aeron spiras ;  
kiam nian la animon  
ĉio plene tre ĝojigas,  
kaj tre alten, alten, alten,  
rapidege penso iras,  
kvazaŭ farus ĝi petpreĝon,  
ĉar al ĝi tuj min incitas  
rememoro, ha !, pri io,  
kion koro ambicias ;  
kiam miaj la okuloj  
tre avide ekrapidas  
sin direkti malproksimen,  
ĉar ŝi tien min altiras  
kvazaŭ pova la magneto.

Tiam mi rajdadas, vipas  
mian la ĉevalon noblan,  
delikate ĝin instigas  
mi ; ja ĝi galopas, trotas.

.....  
Sajnas, ke alproksimiĝas  
celo de la mia koro.  
Mi en plena revo miras,  
ĉar feliĉa mi min sentas !

.....  
Sed, ho, ve !... Bruege ridas  
iu, kiu min mokegas,  
kiu ŝercojn al mi diras...

.....  
Ve ! La revoj tre rapide-  
falas ! Baldaŭ mi konscias :  
ja spiradas bruetante  
«Ofendido», kaj ĝi ŝvitas,  
ĝi al mondo de l' kruela

realeco min venigas :  
«Ha, tre nobla mia bruto!»,  
mi pentite tuj ekkrias,  
dum sur ĝian belan kolon  
tre rapide mi min klinas,  
por ĝin ame karesadi ;  
kaj dankema ĝi montriĝas,  
ĉar ĝi sian kapon turnas  
al mi. Mi ĝin ripozigas,  
kaj al ĝi alparolante,  
al la urbo mi ĝin gvidas,  
kiam jam silento regas,  
kiam birdoj jam ne trilas,  
tial ke jam ĉiuj dormas ;  
kiam la cikadoj grincas ;  
kun doloro ĉe l' animo  
hejmen mi returneniras !...

## V I N T R O !

(ROMANCO)

La malvarm' kruela regas.  
Tre plumbgriza la ĉielo  
restigadas la estulojn  
plene en glaciinfero,  
eĉ senbrua, tre malluma,  
ĉar de l' suno ĝia helo  
jam apenaŭ al ni venas  
trapasante kun penego  
la nubaron densan, grizan,  
kaj de kiu falas neĝo,  
jam kovrinte de antaŭe  
la supraĵon de la tero,  
kiu transformiĝas baldaŭ  
laŭ grandega blanka ĉerko ;  
same. kiel ve ! en tiu  
de knabino kuŝas revo

de amanto sindonema,  
kiun kaptis senespero,  
ankaŭ en ĝi entenata  
estas granda la ĉagreno,  
eĉ multege pli ankoraŭ :  
plene ĉia korpsufero !

Iru ni al la kamparo,  
al humila la dometo,  
singardeme proksimiĝu,  
kaj rigardu tra la fendo  
de la pordo : familio  
jen, sidante ĉe fajrejo,  
kie brulas kaj bruladas  
la ŝtipegoj de la kverko,  
kies flamoj estas lumo  
al ĉambraĉo de la hejmo ;  
vidu kian la malĝojon  
montras ĉies ve ! mieno ;  
la edzino kaj infanoj  
turnas al familiestro  
siajn la okulojn lacajn.  
La rigardo estas peto  
penetranta en la koron  
de la patro, de la ĉefo,  
tre rapide stariĝanta,  
pro terura fulma penso  
ordonanta lin foriri :  
li aliras al fenestro  
rigardadi la kamparon...  
Falas kaj faladas neĝo !  
Vidu kiel tuj invadas  
korpon lian frosta tremo,  
kian la doloresprimon  
rimarkigas lia gesto ;  
kiel prenas li pafilon  
kaj sin ŝirmas per mantelo,  
tute preta por eliri.  
Kison ĉies ja buŝeto

donas al li, kaj edzino,  
per plej granda la kareso,  
maltrankvile eĉ angore,  
ekplorante, al la edzo  
ŝi sin ĵetas, murmurante  
korparolojn ; en brakpremo  
dum momentoj ili restas ;  
sed kruela la neceso  
nepre, do, disigas ilin !  
Ĉu por longa la foresto ?  
Kiu scias ? ! Tre kruela  
kaj danĝera la vetero  
estas, kaj ĉu li atingos  
la feliĉon de l' reveno  
por satigi la infanojn ?  
Eĉ el pano iu peco  
jam ne restas ! Kion manĝi ?  
Tie regas mortsilento,  
kiun nure interrompas  
de infano iu ĝemo,  
de amanta la edzino  
la paroloj de la preĝo,  
kaj konstanta la siblado  
de la glaciiga vento !  
Tra l' kamparo vi rigardu :  
bird' neniŭ tra l' aero  
flugas ; sur la blanksupraĵo  
iras jam neniŭ besto ;  
nur rimarku la restsignojn,  
kiujn lasis ĵus piedo  
de la edzo foririnta !...  
De la neĝ', ve !, jen kruelo ! ! !...

Simpatia kaj humila,  
malfeliĉa la pasero  
tre malsatas, kun angoro,  
sub tegolo de l' tegmento !  
Nu ; aŭskultu : al ni venas  
ĝia doloriga pepo

tiamaniere kvazaŭ  
ĝi pri sorto estus plendo.  
Ve! La birdo... malfeliĉa!  
Ankaŭ mankas al ĝi greno!  
Ankaŭ ĝi tre malsatadas!  
Kruelmortiganta neĝo!!!...

Reaŭskultu, reaŭskultu!  
Ĉu vi jam ne aŭdas? Bleko  
tre malgaja al ni venas.  
Malfeliĉo! Jen kompreno:  
iu best' angore blekas  
ĉar mankadas al ĝi herbo;  
tial, besto malsatadas.  
Martiriga estas neĝo!!!...

Tre mortiga neĝo estas:  
ĝi de l' vintro la malbeno  
estas, portas ĝi dolorojn;  
sed post vintro la printempo  
venas kaj ĉesigas ilin.  
Sed la granda senespero  
kiu vivas en la koro,  
por ĉi tiu, dum eterno,  
estas tre terura vintro,  
estas plenglaciinfero!!!

## SPITE DE ĈIO

(ROMANCO)

Kial ĉiam la Fatalo  
akre mian koron celas?  
Kial senkompate vundas  
tiun, kiun mi amegas?  
Kial ĝi, do, mian senton  
en la mia kor' kunpremas  
kaj devigas min silenti?

.....



Resti mi lojala devas,  
kaŝi ĉe korprofundaĵo  
tion, kion mi silentas,  
ĉar postulas al mi tiel  
sento, kiu koron streĉas ;  
tial nur ĉi tiuj kantoj  
kiel ĝojo al mi restas !  
Diro, vorto, rememoro,  
eĉ ĉagreno, ĉiam estas  
dolĉa al la koro mia ;  
kaj ĉu ŝajnas, ke ĝi plendas,  
ĉar kruelan la doloron  
la hazard' en ĝin entenas,  
ne atentu vi pri tio,  
nur konsciuj : mi ne pentas,  
ne, kantadi mian senton,  
tiun, kiu min plenregas.

## Ĉ E M A L L I B E R E J O

(ROMANCO)

Ve, denove malfeliĉo !  
Fruumatene, la vendredon  
dudekkvinan de junio,  
mi eniras en karceron,  
ĉar minacas Diktatoron  
grava la militribelo ;  
tial estas tre necese  
ĉiujn kapti sen deteno,  
la progresempulojn, ĉiujn,  
tute nepre sen escepto  
same, kiel faras brave  
en okazo por danĝero,  
ĉiam, ĉie, senskrupula  
kaj tirana la regnestro,  
atentante ambicion,  
ne ve ! la popolaferon

por feliĉo de la lando :  
mankas al li konscienco,  
kaj li regas nur gvidate  
de l' obstino kaj fiero  
kaj malatentante ĉiam,  
ke perforto estas semo  
de perforto, kaj ke rajto,  
prave, amo kaj justeco,  
fine nepre ĉiam venkas,  
kiel sekvo de progreso.

Jen ni, inter dikaj muroj  
de l' deksepa militĉelo :  
pord' masiva kun seruro,  
dika la riglil' el fero,  
kaj kvadrata kaj malgranda  
truo, kiel observejo,  
por ke ĉiam la viglanto  
vidu mian la sintenon ;  
defendata de ferkrado,  
kontraŭ pordo, la fenestro ;  
fera lit', kun litotukoj  
la matrac' kaj kapkuseno ;  
vitraj glaso kaj la kruĉo,  
sur nokttablo, kies kerno,  
noktovaz', malbonodoras ;  
de la lito, ĉe l' piedo  
kaj laŭlonge, tapiŝaĉo ;  
staras fi ! urinvazego,  
sub la lito kaj kaŝite,  
por se nepre la neceso,  
ĉar dum tuta noktopaso,  
neutila estas peto  
por alkuri de la ĉambro  
al apuda necesejo.

Malgrandeta ĉiotablo  
kun malpura la tirkesto  
ok-naŭ centimetrojn alta,  
tre ridinda kvazaŭ meblo !

En angulo de la ĉambro :  
lavovazo el fajenco  
nigrigita de malpuro,  
difektita de la fendo ;  
ankaŭ la sapuj' malnova,  
kiel tuta la cetero,  
kuŝas sur malpura ligna  
iom lama tripiedo ;  
fera la kraĉuj' naŭzanta  
sur tenil' en anguleto.  
De sur muro, pendigilo ;  
kaj vidiĝas reliefo  
de tintilo kaj la lampo,  
funkciantaj per elektro ;  
sed la lampo lumas same,  
kiel de mortint' kandelo.  
Duoncirkla, la plafono ;  
unu sola ligna seĝo,  
por sidadi intertempe,  
sur malpura pinpargeto.  
Diru : ĉu mi faris bone  
de l' ĉambraĉo la desegnon ?

Alveninte je la tria  
frumatene al la ĉelo,  
post pasado de la nokto  
ne ferminte la palpebrojn,  
mi min ĵetas sur la liton,  
demetante ne la veŝton,  
nur gamaŝojn, spronojn, botojn,  
jakon, kaj kun singardemo,  
ĉar mi timas la pikadon  
de naŭzantaj la insektoj,  
sangan soifantaj cimoj,  
kies estas la parencoj  
nombraj niaj similuloj :  
*Sur ĉi tiujn, abomeno !...*  
Baldaŭ mi endormiĝadas,  
sed... «Furioj de l' Averno !

Ĉu jam oni min transportis  
de l' Diablo al la regno?»...,  
vekiĝante kaj saltante  
de sur lito en pargeton,  
mi min diras, kaj lumigas  
tuj la ĉambron. Jen l' insektoj!  
Sed ĉu cimoj, veraj cimoj?

Des pli bone cimkameloj  
laŭ brutaro sin promesis  
elsangigi miajn vejnojn.  
«Tial, do, ĉu cimbuĉado?  
Kial kiĥotentreprenon  
celi? Kiel? Ĉu per spronoj?  
Tion fari estus ŝerco!»  
Mi decidas min sidigi  
kaj atendi tagalvenon  
por alvoki oficiron  
kaj esprimi mian plendon.  
Vi supozu de l' sidado  
oportunon por dormemo.

Tute bone purigadas  
la soldatoj mian ĉelon.  
Dormi bone ĉiunokte  
mi esperas kun kontento.  
«Sed, ho!, kiel mi pasigos  
tagajn horojn? Sen papero,  
libroj.., en senlaborado!  
Ho, ve! Ĉu min kaptos tedo?»  
Petas mi blankslipojn, librojn...

Mi rezonas; tamen, neon.  
Laŭ ordon', mi devas resti  
en izolon, en silenton  
absolutan, sen rilatoj,  
kondamnite al frenezo,  
«spite de homamo», ĉiel:  
de l' ribelo la sekreton  
koni jam, postulas tion.  
Mi nun estas kvazaŭ besto!

Eĉ pri famili', nenion!  
De l' regantoj kia menso!  
Ĉu laboro en izolo,  
la legado, fari verkon  
kaj cetere, rezultigus  
ne malkaŝi la ribelon?  
Bedaŭrinda la konscio!

«Vivu, do, la libereco!»  
«Vivu homaj rajtoj!» diras  
ankaŭ nunaj gubernestroj,  
makulante siajn lipojn  
per mensogo kaj blasfemo!

«Ĉu mi ellitiĝas frue?»

Ne, ĉar estas mia celo  
plilongigi la dormadon  
por ŝparadi la suferon.

«Jus ellitiĝinte, kion?»

Gimnastikan la ekzercon,  
ĉar en korpo sana ĉiam  
ankaŭ sana intelekto.  
Poste mi min banas. «Kiel?»  
Mi klarigas la problemon  
nur havanta lavovazon,  
kaj ne ridu, jen elpenso:  
post korpparto, novan parton;  
post banparto, ĝian sekvon,  
la viŝadon: la vizaĝon,  
kolon, trunkon kaj ingvenojn,  
unu kruron post alia  
kaj sinsekve la piedojn;  
longedaŭra banlavado,  
kiun faras mi kun peno,  
surverŝante grandaparte  
de la ĉambro la pargeton,  
sed ĉi tio estas deca.

Mi min vestas laŭ inverso;  
poste mi min razas, kombas,  
kaj purigas miajn dentojn.

Eĉ mi lavas la naztukon ;  
kiam seka, de l' kulero  
per tenilo mi ĝin gladas :  
aŭdis mi dum infaneco,  
kiel mia patr' esprimis  
tiam strangan gladprocedon  
por blankpantalono gladi,  
la lacigan grandan penon  
por atingi laborfrukton  
la soldatoj en kaserno ;  
efektive, la penadon  
mi konstatas per la sperto,  
sed utila al mi estas  
iel pasigadi tempon.

Kompreneble, devas esti  
glata vosto de l' kulero.

Mi sonoras la tintilon,  
de viglanto jen alveno :  
petas mi purigu ĉambron ;  
tiam granda diligento,  
dum en koridor' mi restas,  
kaj denove al la ĉelo.

Sekve mi promenas iom,  
de l' manĝaĵoj dum atendo.  
Jen manĝaĵoj ; min ĝojigas  
per manĝaĵoj la diveno :  
de l' familianoj kisojn,  
amon. fortan la brakpremon,  
korajn vortojn por revido!...

Mi. nu, manĝas en kontento  
kaj denove mi promenas  
ĉu kantante la «Esperon»,  
ĉu popolajn kantojn, kiuj  
diras pri la naskiĝejo,  
ĉu la belan himnon nian  
«Sub standardo verda preĝor»,  
ĝis laciĝo. kompreneble.

Mi. do, haltas ĉe l' fenestro :

de ĉi tie mi rigardas  
de la korto la muregojn  
altajn kun fenestroj multaj ;  
ĉe la fundo, ripozegan  
de hundino plenbanata  
de la suno sur la tero,  
apud vinberujaj trunkoj,  
kies branĉoj en fenestrojn  
rampas ilin ŝirmi kontraŭ  
la radioj de l' astrestro ;  
aŭ soldatojn, kiuj ludas  
por amuzi sin laŭ eblo,  
ĉar sur ilin pezas ankaŭ  
de malliberec' la ĝeno ;  
foje, kiel milvo flugas  
alten, ronden, kun majesto,  
sed terurigante birdojn,  
kiuj sentas la danĝeron  
— homoj ankaŭ nun sentigas,  
kiel milvoj, la kruelon ;  
foje, kiel gehirundoj,  
alvenante sian neston,  
hirundidojn nutras, kiel  
tiuj ĉi malfermas bekojn  
por ricevi de gepatroj  
ĵus kaptitajn la insektojn ;  
ĉu ekstaze longatempe  
rigardadas mi la helon  
de la ĉiam pure blua  
kaj ravanta ĉielsfero ;  
ĉu sub bluo, de l' hirundoj  
flugon super la tegmenton,  
tra la senmakula spaco  
dum ekkrias ili pepojn  
kvazaŭ salutante ĝoje  
la finiĝon de l' vespero.  
Ankaŭ same, kiel ili  
flugas, flugas mia penso

tra l' senlima blua spaco  
sen la baroj de l' katenoj ;  
flugas ĝi serĉante lokon,  
kie amo estu reĝo,  
kie homoj sin konduku  
reciproke kun respekto,  
kaj adoru, super ĉio,  
la belaĵojn kaj la veron...  
Sed hirundoj jam ne pepas,  
rifuĝiĝis en la nestojn ;  
de l' ĉielo la griziĝo  
forflugigas mian revon  
kaj revanta penso mia,  
ja, revenas al la ĉelo.  
Multfoje mi promenas  
sane, kiel faras besto  
paca, stranga aŭ sovaĝa,  
en la kaĝo de ĝardeno ;  
sed, jam laca, nova halto,  
ĉu starante ĉe l' fenestro  
kun vaganta la rigardo  
en najbaran la kasernon,  
en figuĵojn, akaciu,  
de la korto, en eteron ;  
ĉu ĵetante min en liton ;  
ĉu mi falas sur la seĝon,  
min dolore cerbumante.  
Tiel mi pasigas tempon,  
sane ĉiujn, ĉiujn tagojn !  
Kaj la noktoj, pro l' dormemo,  
estas multe pli indulgaj ;  
tamen, ne min kaptas tedo :  
al obstina grandanimo  
ne alestas senespero !  
Ĉiunokte je la naŭa,  
kiam vokas la trumpeto  
la soldatojn enlitiĝi  
en najbara la kaserno,



karceristo frapas kradojn  
per malnova bajoneto  
por se oni fajlis ilin  
koni de la krad' difektojn :  
*rak-rak-rak-rak-tik-tik-tik*  
de la ŝtalo kontraŭ fero  
bruas karceristo-frapoj  
meze de la noktkvieto.  
Tute same ĉiutage  
de l' tagiĝo dum sereno  
karceristo kradojn frapas ;  
ĉiel rompas li silenton  
kaj min vekas, bedaŭrinde :  
malbenata bajoneto !  
Sed vi certe vin demandas :  
«Kiam faris vi ĉi verkon ?»  
Ha, karuloj ! Jen klarigo,  
kiu donas la komprenon :  
Deŝoranta oficiro  
havas grandan kompatemon  
kaj, kaŝite, al mi donas  
kvin-ses slipojn. Ha, paperon  
havas mi ! Je la okazo  
la plej grandan trezoregon,  
kaj avare mi ĝin uzas  
por verkadi la poemon,  
kiun eble vi ne ŝatos,  
kvankam diras ĝi la veron  
kaj mildigas iomete  
de l' diranto la ĉagrenon !

.....  
Je la sepa tago, fine,  
bonsukcesas miaj plendoj :  
mi jam havas belan libron.  
«Kian ?» Riĉan la juvelon.  
Miru, ĉu ne ? «Don Kifhoton».  
For, for de mi la ĉagreno,  
la Manĉuja Kavaliro  
helpos mian la mizeron !

## AL FINLANDANINO

Karulino de Finland',  
malproksime de via ĉarmo,  
ĉe kontraŭa terorand',  
tute mankas al mi la varmo,  
    kiun elradias vi  
per belegaj okuloj bluaj,  
kvazaŭ steloj ja por mi ;  
per paroloj belsone fluaj  
    kun esprimoj de la kor' ;  
per la rozoj de vangoj viaj,  
kun plej bela la kolor' ;  
per talio kaj brust' graciaj ;  
    per la buŝo, ja d'iant'  
el petaloj tre delikataj ;  
per la via bel' sen vant'...  
Estu, do, de vi tre ŝatataj  
miaj diroj de la kant'.

## ĈIAM KANTO AL AMO

Etendiĝas mia voĉo, vibras ;  
ĝi estingas poste sian ardon,  
ĉar la koro mia tre moviĝas  
kiam mi kantadas mian amon !  
    Amsopiras dum la tuta vivo  
la tre amantema najtingalo ;  
de l' kolombo milda lasta spiro  
jesas pri la nevenkebla amo !  
    Ĉiam li vagadas sur la tero  
tre malfeliĉega, la Kantanto !  
Lia tuta vivo estas temo  
de la kantoj liaj pri la amo !  
    Kiam morto min ankoraŭ junan  
ekforrabos, tiam la okazo

ne min donu sorton tre teruran,  
ke mi povu kanti pri la amo!

Se por kanti mi ne havus fortojn  
en la tiel malfeliĉa tago,  
alvenigu al mi ĉiujn strofojn  
de la karaj kantoj pri la amo!

Malriĉulo, mi, almozon petas,  
tuj de Dio venos al vi pago,  
ĉar mi, kiel monon, sole tenas  
miajn korajn kantojn pri la amo!

## N E T I M U !

(BARKAROLO)

De la ondoj per la forto,  
—je subita fulmo hela—  
jam vidiĝas al la morto  
rapidiri barko vela!

*Jam ekregos direktilon  
sperte mia mano ;  
rehavigu vi trankvilon  
spite l' uragano !!!*

Tre trankvila kaj kuraĝa  
la maristo, kaj tre sperte,  
dum ventego eĉ sovaĝa,  
la havenon trafos certe!

*Jam ekregos direktilon  
sperte mia mano ;  
rehavigu vi trankvilon  
spite l' uragano !!!*

Vi ne timu, do, la maron ;  
de la furiozo ĝia  
rompos certe tuj la baron  
la trankvila mano mia!

*Jam ekregos direktilon  
sperte mia mano ;  
rehavigu vi trankvilon  
spite l' uragano !!!*

## JE LA VESPERA KREPUSKO

Sidas mi en la ĝardeno.  
Suno finas subeniri.  
Birdoj ŝajnas jam sopiri  
pro proksima ombralveno.

Elmontriĝas la Naturo  
bela kaj eĉ fruktodona !...  
Sonorilo tre belsona  
preĝalvokas de la turo.

Papilioj plenkaprice  
flugas, planto en alian,  
elmontrante amon sian  
frenezegan senmalice.

Rapidflugas la abeloj,  
multaj florojn ja gustumas,  
dum aliaj ĝoje zumas  
promesante pri mieloj.

De la simpatia grilo,  
ĝi ne pro kantado penas,  
akrasone al mi venas  
la tre monotona trilo.

Kaj de super la lekantoj,  
min pri amo diras jese  
najtingalo, kaj senĉese  
per tre belaj ravaj kantoj.

De kamparo tre proksima,  
kie la koturno nestas,  
ĝia kanto apudestas,  
forta kanto eĉ sentima.

Kaj de l' valo, de la fundo,  
dum rivero ĝia fluas

kaj samtempe ankaŭ bruas,  
la bojado de la hundo.

Movas la dolĉeta vento  
de la floroj la petalojn,  
kaj belegajn la konvalojn,  
kiujn ŝatas mia sento.

La venteto tra folioj  
kiel murmuradon faras ;  
plenaŭde mi jam faras  
la parfumon de lilioj.

Ĝis la sentiga horo !  
kiam mi pri amo revas  
kaj la puran senton levas  
al ŝi tre fidela koro !!!

## K O N S T A T O

Proverbo diras : «ĝis la tomba glacio  
figuro, karaktero eĉ la genio».

Do, mi min turnas al vi de ĉi tie, *Berdun*,  
denove, kiam jam dekunu jaroj forpasis  
tre ĝuste de l' tiama tempo rava en nun.  
Pasado de la temp' ne mian senton frakasis.

Al tiu nobla kaj profunda sento sufiĉas  
sincera rememoro ; kaj mi, tial, feliĉas.

## HO, MARI!' HO, MARI!' (1)

### I

Virin' de mia revo,  
dilumo por animo,  
per mia kantesprimo  
vi amon scias jam.  
Por vi nur mi mortvivas,

(1) Kantebla per muzikajo de Eduardo di Capua. La kanto estis de kantistino  
Olimpia D'Avigny.

sen vi la mort' tuj venos ;  
por vi, mi vivi penos.

Jen mia la promes' !

*Ho, Mari' ! Ho, Mari' !*

*Ĉar sopiras por vi mia kor',  
min amu vi,*

*atentante pri mia dolor'.*

*Ho, Mari' ! Ho, Mari' !*

*Ĉar sopiras por vi mia kor',  
min amu vi,*

*ho, Mari' !, ho, Mari' !*

## II

Dum sonĝo tre feliĉa,  
mi kore vin posedis ;  
vin mia, do, mi kredis !...

*Malgaja la vekig' !...*

Mi kredis, eĉ sendorma :  
la kredon vi fortiris,  
al mi vi koron ŝiris !...

*Ne sonĝo, revo, plu !...*

*Ho, Mari' ! Ho, Mari' !*

*Ĉar kruela estas via kor',  
ve, Dio ! Fi !...*

*Jam mortigu min tuj la dolor' !*

*Ho, Mari' ! Ho, Mari' !*

*Tre kruela por mi via kor' !*

*Neniu pli !...*

*Ho, Mari' ! Ho, Mari' !*

## III

Kaj tial mi pasigas  
dolore, senespere,  
la vivon, tre mizere,  
ĝis morto venos jam !  
Pro tio, mi deziras,  
ke morto baldaŭ venu,

rapide min forprenu  
el tera la infer'!

*Ho, Mari'! Ho, Mari'!*

*Ĉar kruela estas via kor',  
ve, Dio! Fi!*

*ĵam mortigu min tuj la dolor'!*

*Ho, Mari'! Ho, Mari'!*

*Tre kruela por mi via kor'!*

*Neniu pli!...*

*Ho, Mari'! Ho, Mari'!*

## **A N T A Ŭ E N !**

(HIMNO)

### I

Atentu la vokon!  
Nu ; nia falango  
de loko en lokon,  
ĉe l' pinto de stango  
flirtanta la Verda Standardo,  
senĉese jam kuru ;  
labori obstine, kun ardo,  
fervore, do, ĵuru!  
*Antaŭen kuraĝe,  
kun fid' en la koro ;  
antaŭen kuraĝe  
al nia laboro,  
kun fid' en la koro!*

### II

La lingvon diskonu  
tra ĉie senĉese ;  
ni lingvon entronu  
rapide, sukcese,  
ĉar lingv' Esperanto ja havas

fratigan la celon ;  
el lukte Homaron ĝi savas,  
forigas kruelon !  
*Antaŭen kuraĝe,*

.....  
.....

### ESPERANTA MARŜO (1)

Zamenhof, elpensinto  
supergenia  
de nia lingvo helpa  
internacia,  
al Mondo per ĝi donis  
grandan IDEON  
INTERNAN, SENTON NOVAN,  
belan la KREON,  
grandan IDEON  
INTERNAN, SENTON NOVAN,  
belan la KRE-E-ON,  
por la feliĉo de la HOMARO.  
Ha, kiel granda tia BONFARO,  
ĉar HOMON faras ĝi tute FRAT'  
ĝi tute FRAT',  
plenumante la nepran homaman devon  
realigante revon  
kun granda ŝat',  
realigante revon  
kun granda ŝat'.  
La lingvo ESPERANTO  
ĉiam progresas,  
en rondoj malsimilaj  
grave sukcesas.  
Estas la ESPERANTISTOJ  
POPOLAMASO,

---

(1) Kantebla laŭ muzikajo de l' komponisto M. Nieto el teatraĵo «Los trasnochadores», Marŝo «Estudiantino» studenta.



ĉe l' MONDO grave bruas  
LIA la paso,  
LIA la paso,  
ĉe l' MONDO grave bruas  
LIA la pa-a-so.  
Kaj nia frata paca laboro  
fariĝas plene ĝojo por koro  
ĉar trafas plene nin NOVA SENT',  
nin NOVA SENT',  
ĝojigante popolojn per sia celo,  
kaj fariĝante belo  
al ĉiu GENT',  
kaj fariĝante belo  
al ĉiu GENT'.

## KORA PLENDADO (1)

### I

Mi, blokite de la neĝo,  
pro perforto de fileĝo  
kaj de bruta malestimo,  
mallibera en kastelo  
pro frakaso de ribelo  
kontraŭ diktatora krimo,  
en masiva ĉambro ŝtona,  
kvazaŭ tombo faraona,  
ĉe l' hispana norda limo ;

en izolo, for de l' bruo,  
de l' malĝojo sub l' influo ;  
mi transdonas sentesprimon  
al poem' originala ;  
spite de la viv' fatala  
ne sentante ian timon.

---

(1) Verkita en la fortikajo *Coll de Ladrones*, dum mia mallibereco, vintron de 1931.

Dank' al fortaj fantazio,  
kor' kaj korpa energio,  
mi facile trovis rimon.

## II

Por junuloj, ĉu poemo  
kun pasie ama temo,  
ĉar al ili estus ĝojo?

Ne virinoj amon volas  
nun ; en inaj koroj rolas  
or' ; al ili tia vojo !

Am' al ili, nun, malsaĝo  
estas, eĉ mensog'. Domaĝo !  
Fiulinoj je ci fojo !

Estu nun al mi aŭskulto  
via, fratoj, ne la stulto ;  
tiel, do, al vi kompreno :  
am', tirana ; ne rezulto  
nova. Ĉu, do, amokulto  
ĉiam estis ? Nu ; veneno  
iam. Bela, jes, laŭ multo  
in' en pac' ; sed en tumulto  
same estas ŝi. Ĉagreno !

Am' facile koron lulis  
iam ; kor' en amon brulis :  
fajr' cindrigis ja la koron !  
Ĉio estas seko, rubo ;  
ne plu am', nur ombra nubo :  
am' nur lasis rememoron !  
Mia la vizaĝ', senpova ;  
kiel de mortint', senmova,  
nur vidigas la doloron !

Kor' ĉe nigra nubo dronas...  
«Ne mensogu !», Di' ordonas ;  
sed abunda jen mensogo !

Mi ne je la vivo fidas ;  
mi malfirma ĝin nun vidas :  
post la nuna bon', delogo !

Blinde marŝas ni sur tero  
sub Destira la Mistero...  
Nur ripoz' ĉe mortotrogo !

Ĉar jam la printemp' ekfloris,  
ĝin la homoj feste gloris ;  
al la koroj, gaja l' ago.

Kiel birdo, flugis koro  
tiam al la lum', al floro :  
kor' sanĝiĝis tag' post tago !

Tiam, ter' al mi, edeno ;  
nun, por ĉiam, jen ĉagreno  
eĉ por vivo de l' imago !

### III

Baldaŭ tagojn oni festos.  
Ĝoj' revivi ilin estos !  
Paca vento dume blovos.

Oni karulinojn vidos,  
apud kiuj oni sidos ;  
kaj parfumon, belon, trovos.

Tute ĝoje koroj batos.  
Tia ĝojo min malŝatos.  
Ilin ĝui mi ne povos !

Jen tuj de la Pask' alveno ;  
sed en mia kor' ĉagreno !  
Karulino mia kuŝas

pro malsan' dolore grava ;  
ŝia la vizaĝ', tre flava,  
ĉar ŝin Morto jam ektuŝas !

Di' potenca, al ŝi sanon !  
Vian la savantan manon  
ĉu, ne vi, en ŝin enpuŝas ?

Bela karulin' ĝentila  
kun tre bruna haŭto brila  
kaj el haroj diademo ;  
mi freneze ja cin amis  
ĉiam, kiam koro flamis  
ame patre laŭ ĉkstremo.  
Frenezigis min pasio  
al malsaĝo..., kaj pro tio,  
jen al mi la kora tremo !

Radiana klara stelo  
brilis... Ĝstis ŝi !... Kruelo !  
Kio ĉe l' animo mia ?  
Ŝi kolombbrunecon havis ;  
ŝi, juvelo riĉa, ravis ;  
tre gracila ŝi, gracia ;  
ŝia belo, por mi kara,  
kiel de l' gazel' *Sahara*...  
Mortis ŝi !... Doloro kia ?...

Ama la ekfulm' radia  
jam en vivovojo mia,  
al malsana kor', ne ŝato !  
Dolĉa l' am' ne kora signo  
nune ; estas nur rezigno :  
koron romp'is mortobato !  
Sorto mia pli kruele  
ol de virinaĉ' malbela  
ĉe malĉastulina strato !

#### IV

Fojojn, ĉu diabl' reala  
mi ? — Destino fatala !  
En min la malbenpotenco !  
Ĉu amiko nobla ? Kie ?  
Mi ja estas fremda ĉie  
dum ĉi temp' de dekadenco !  
La malbonon mi ne faris ;

la suferon mi ne ŝparis :  
kontraŭ mi, malbontendenco !

Mi la veron ĉiam ŝatis  
eĉ ĉe kiuj min fiŝlatis ;  
sed la nuna temp', doloro !

Di' bonulojn jam ne amas ;  
Di', por ĉiuj, jam ne samas,  
ĉar al iuj, plenfavoro ;  
por aliaj, grandaj penoj,  
estas, kvazaŭ Dimalbenoj !  
Al mi, ne feliĉa horo !

Estis bon', por mi, Destino ;  
mia ŝat' al Ver', sen fino :  
min bonulo oni vidas.

Mia gvid', la Bono estis ;  
frato nekredema restis,  
kaj konstante ĝoje ridas.

Al mi, pura kaj fidela,  
viv', dum, estas tre kruela.  
Malbonsort' min ĉiam gvidas !

Ĉiam petis mi pardonon  
ĉu mi faris, do, malbonon :  
donu Di' al mi ĉielon !

Por la Bon', mi ĉiam vivis ;  
mi ĉe nobla revo drivis  
ĉar mi amas sanktan celon.

Min tra ĉie ventoj ŝovis  
kiel birdon ; mi ne trovis  
de l' patruj' kaj hejm' kielon !

De la vivo mia trudo  
estis la fervora studo  
en izol', por mia scio.

Mi ĉi tiun tute kaŝis ;  
sed al ĉiuj ĝi forpaŝis

per la kora energio,  
kreskadinte ĉe l' silento.  
Ĉu klerulo mi? Ve, pento:  
estas vere mi nenio!

Resaniĝi, peno vana!  
Mi, spirite tre malsana!  
Min amikoj vidas fie!  
El neniŭ al mi mano!  
Viv', amara la tizano!  
Kiuĵ amis min kaj kie?  
Belaj tagoj gajaj pasis!...  
En frostej' min oni lasis!  
Sed, ĉu Di' pardonos pie?

De l' juneco pasis horo,  
brutvelkigis ĝin doloro;  
troa mia la turmento  
mian la vizaĝon stampis,  
kvazaŭ lepro en ĝin rampis;  
jen, forkuras de mi gento!  
Kor', laŭ torĉ' al vento, brulas;  
min jam senespero rulas  
sen la homkompata sento!

Venu al sufero fino!  
Ve, nur estas mi ruino  
turmentita de tortur'!  
Ĉarm' mistera de l' ĝardenoj!...  
Ore brilas la ebenaĵoj,  
same la riĉec', plezur'...  
Tamen ne por mi kontento,  
eĉ nenia ĝoja sento...  
Mi, folio seka nur!

La Destin', nur leĝ' severa,  
el Scienco plej supera;  
vanta, tuta la cetero!

«Iuj en feliĉ' deliras ;  
viv' agrablaj», oni diras :  
ĉu ja tio estas vero?

Sed ĉar mi suferas multe ;  
peza vivo, do, rezulte !  
Tamen, kun la Mort', espero!...

V

Kara bird' ekflugu nun  
tra radioj de la sun'  
hela, krozu la ĉielon,  
al la hejm' de karulin' ;  
ŝi akceptos ĝoje cin :  
ĝuu ŝian grandan belon !  
Al amatoj la estimon  
portu kaj salutesprimon ;  
al ŝi, fortan amfidelon !

## AL ZARAGOZA MITINGO

DE LA 15<sup>a</sup>-IV-1928

Ho, vi, la glora Zaragozo !  
De l' patrujano *Meko* mia ;  
el ĉiuj, plej heroa ; rozo  
kun ĉarmo plene simpatia ;  
staranta ĉe la val' de l' *Ebro*,  
bruanta nun pro fest' al *Goja*,  
montranta sin laŭ plena febro  
de gloro kaj laboro ĝoja ;  
vi ankaŭ esperante revas ;  
jen, kial via la mitingo.  
Vi verdan flagon alten levas,  
kaj flori la laboro devas  
abunde, kiel nun siringo  
en ĉiuj kampoj plene floras.  
Mi tion kore ja deziras ;

por tio varme vi laboras ;  
al tio varme vi sopiras :  
la LINGVON tiel vi jam gloras !

## HIMNO AL ASTURIAS

### I

De nia la lando altegaj la montoj  
Disŝiras per pintoj belegan lazuron ;  
La vent' tra l' arbaroj, riveroj kaj fontoj,  
Flustradas konstante ravantan murmuron,  
Kaj naskas ĉe koroj grandegan plezuron !

De nia la lando mirinda la bel',  
De nia la lando mirinda la ĉarm',  
Sentigas nin ĝoje kun granda la varm'  
Pri «Nova la Sento» kaj «Homa la cel'» !

*Indiĝeno grandanima*  
*De ĉi tiu lando rava*  
*Jam sin sentas tute prava*  
*Celkonscia kaj sentima*  
*Por esprimi per la kant' :*  
*«Celo» estas Esperant' !*  
*Estas «Nova Sento» Esperant' !*

### II

Ruladas libere de l' maro la ondoj  
Sinsekve disiĝi en sablon, en rokon,  
Mortante ĉe blankaj la ŝaumoj laŭ rondoĵ...  
Kortuŝe sentante de l' morto sufokon,  
Aŭskultas samtempe ni «Fortan la Vokon !»

Ĉar el furiozo aŭ milda seren'  
De l' ondoj mortantaj ĉe sablo aŭ rok',  
Niu trafas ĝojige mirinda la «Vok'»,  
La «Voko» nin ravas tutplene, sen pen' !

*Indiĝeno grandanima*

.....



## UKRANIA KANTO

### I

Ukranio tre amata  
de mia koro,  
tiu de l' kamparo plata,  
kie kreskas delikata  
tre bela floro,  
apud amovojo glata.

### II

Al vi sendas mi amsenton  
per kanto mia ;  
certe havas vi kontenton  
ĉar vi donis la konsenton.  
Fein' gracia,  
vi neniam havos penton !

## TURKA KANTO

### I'

Mia kora sentemo  
flugas tute subtile  
trans la krad' de l' haremo.

### II

Post la krado sopiras  
amatin' maltrankvile,  
ĉar ŝi arde deziras :

### III

Por ŝi estu mi savo,  
kaj fariĝu facile  
tiel ŝia la sklavo !

## PLUVAS, PAŝTISTO!

(FRANCA KANTO.)

### I

Paŝtisto, pluvas, pluvas,  
kaj blovas l' uragan' ;  
ĉar preskaŭ jam diluvas,  
ni kuru al kaban' .  
Vi kuru tre sufiĉe  
en mia l' akompan' ;  
ne timu, ĉar feliĉe,  
vin gvidas mia man' .

### II

Ni, kvazaŭ kanonpafojn,  
atentu tondrojn jam ;  
ni savu blankajn ŝafojn  
el nuba fulmoflam' .  
Vi kuru, do, senlace ;  
atentu, ke la fam'  
konsilas ĝui paco  
la bonojn de l' gastam' .

### III

Al hejm', unuan fojon,  
de mia famili',  
ni kuru senti ĝojon  
en paca idili' ;  
ni flugu brak' ĉe brako  
—aminda estas li!—  
al mia la barako :  
mi estas papili' !

### IV

Kaj mia la patrino  
kaj mia la fratin' ,

pro volo de l' Destino,  
akceptos kore vin...  
Sed l' uragano pasos,  
alvenos ĝia fin' ;  
ĉu tiam vi forlasos  
domaĝe, nepre, min ?

V

Akceptu vi la ĉarmon  
de virga bela flor' ;  
kaj sentu por mi varmon  
de l' amo ĉe la kor' .  
Por vi jen mia l' amo,  
ne restu via for ;  
ĉar tiel ne balzamo  
ĝi estus, sed dolor' !

VI

Si lian manon prenas  
kaj premas kun kortuŝ' ;  
eĉ ŝi ne sin detenas,  
kaj kisas ŝia buŝ'...  
La kiso tre agrabla  
ja estis kaj ne fuŝ' .  
Ĝi faras lin kapabla  
por ama en ŝin puŝ'...

VII

—Jen mia la parolo,  
amata fianĉin' :  
decidas mia volo  
lojale ami vin !  
—Nu ; petos vian manon  
tuj mia la patrin'  
en vian la kabanon  
por edzinigi min !

## LA ĤOTO DE VALENCIO

«Valencio naskis ĥoton,  
kaj ĝin baptis *Aragon'*,  
en *Kalatajud'* ĝi kreskis  
ĉe la bordo de l' *Ĥalon'*.»

«*Ĥot'* de *Valencio* estas,  
ĝin disvolvis *Aragon'* ;  
sed *Navarro* al ĝi donis  
senton per gitaroson'.»

*Ĥot'* fariĝis poste kanto  
en tutland' per ĝia gent',  
ĉe la Nordo, Sudo, Centro,  
Orient' kaj Okcident'.

Ĉiam *ĥot'* esprimas trafe  
ĉian senton de la kor' :  
la kuraĝan sendependon,  
la ĉagrenojn de l' dolor' ;

aman la pasion grandan,  
la koleron de l' ĵaluz',  
la kortuŝon, la gajecon,  
bonhumoron de la ruz'...

Tion ja konstatis, verse  
la saĝeco de l' popol' ;  
komponistojn trafe ravis  
la mirinda ĥota rol'.

Tial vere la Hispanoj  
jesi povas ja sen vant',  
ke la ĥoto, en la Mondo,  
estas plej supera kant'.

*Pro tio ĥoto ja tute pli kaj pli  
ŝatata estas de la hispana rond' ;  
pro tio ĥot' deirinte de ĉe ni  
jariĝis jama tra la tuta mond'.*

## « NOVA SENTO »

### ANTAŬEN AL PACO

(Esperanta marŝo kantebla per muziko de «*Quand Madelon*», fama marŝo kaj kanto de la «*Poilus*» de Camilo Robert.)

#### I

Jam tra la Mond', sur la Tero kaj la Maroj,  
ja sonas tre forte nia rava kant' ;  
antaŭen, dō, nunc spite de la baroj  
jam iras lingv' zamenhofa, Esperant'.

Belega jen nia standardo  
kun hele verda la kolor',  
sub ĝi kolektiĝas kun ardo  
pacaj soldatoj kun fervor'.

Kaj Pacarmeo ja  
en granda bela ĥor'  
kantadas himnojn, ha !,  
esperojn de la kor'.

*Ni verdan jam la flagon alten tenu,  
ĉe ĝia blank' tre lumu ĝia stel',  
ne l' obstinaj baroj nin detenu,  
brave marŝu al la cel'.*

*Ni marŝu, do, marŝadu kun kuraĝo,  
ĉar tiras nin de l' koro NOVA SENT',  
kaj nin atendas jam kun saĝo  
ĉiu gent', ĉiu gent', ĉiu gent' !*

#### II

La lingvo jam tute bone tro progresas,  
tre vigle tra ĉiuj landoj de la Mond',  
al tiu ĉi grandan bonon ĝi promesas,  
transformi ĝin forta «FAMILIA ROND'».

Laboru ni varme senĉese  
sub verda flago de l' esper' ;  
forigu ni plene sukcese  
bestajn malamojn el la ter' !

Kaj de la Tero for  
jam tiom da sufer',  
murdado kaj dolor',  
malamo kaj mizer'.

*Ni verdan jam la flagon alten tenu,*

.....

## LA BARKOTRENISTOJ DEL VOLGA

### I

Ho, ve ! Jam vidos ne de nun ni  
en Volg' spegul'  
la plektitan branĉaron, ho, ve !,  
de la betul',  
kiun dum ripozdolor'  
ni plektis ja kun fervor'  
de l' kor'.  
Sed nun... ilin for,  
sed nun... ilin for  
pro reveno de l' labor' !

### II

Ha, dolor' ! Ha, dolor' ! Kia sort' !  
Kruel' ! Fatal' !  
Kablon jam streĉu ni, trenu ni  
laŭ animal' !  
Laŭ la strofoj de l' kanzon',  
ni trenu takte, laŭ ton',  
laŭ ton'.  
Vipas nin malbon' ;  
foras la rezon',  
foras nia la rezon' !

III

Ha, ho, ha! Trenu ja, trenu ni!  
Ve sort'! Ve sort'!  
Je la takt' sen rapid' de la kant',  
Jen tren' de l' fort'!  
Akordiĝu nia tir',  
samtempe, do, la sopir'!  
Delir'  
kvazaŭ de martir',  
kies la dezir'  
estas nur libera ir'!

IV

En kien puŝas nin bruta viv'  
ĉe l' homa rond'?  
Kaj kia estis, do, la motiv'  
de l' ven' al mond'?  
Por mi vivi, kia kaŭz'?  
Ho, ve! Jen bruta la naŭz',  
jes, naŭz'  
de la kor', kaj taŭz'  
de l' anim' sen paŭz'  
al doloro, eĉ sen paŭz'!

V

Al la kor' nia jen forta blov'  
de l' malkontent'!  
Kie de la respond' estas pov'  
al kor', al sent'?  
Nu; respondu eĉ demon',  
ĉar ne timigas rezon',  
diridon'  
lia, nek malbon'  
ankaŭ; la malbon'  
estos al doloro on'!

VI

Sed nun, ha ! De la Volg', ĉe l' river',  
ne plu dolor' !  
Ĉie jam bruas nun sur la ter'  
sen halt' motor' !  
Bolŝevika ankaŭ kri'  
triumfa kaŭze de l' sci',  
sen Di',  
venis jam por ni,  
venis jam por ni  
savo per revoluci' !

**AL SAMIDEANOJ**

Samideanoj de mia kara lando,  
samideanoj de ĉiu kontinento,  
ĉesu jam ĉe ni, do, ĉia malkonsento,  
ne plu agadu ni laŭ aparta bando ;  
paco, laboro kaj amo, estu rito  
por Esperanto. Neniel la perforto  
por la afero fariĝos bona sorto,  
estos ĝi kvazaŭ la sekvo de milito.

Venis la tempo utila por laboro,  
kiam trankvile fervore fratoj bruos,  
kiam kunvenojn kontente ĉiuj ĝuos  
certe gvidate de l' sentoj de la koro ;  
kiam ĉeestos multnombre ni kongreson,  
kaj en ĝi ĉiuj kondutos sin ja fratoj ;  
pri organizo ; nu, tiam, la manplatoj  
entuziasme aplaŭdu la sukceson :

Fondu ni solan esperantistan rondon,  
efektivigu ni vere «*Novan Senton*» ;  
ne nur enlanden starigu solan genton,  
sed organizu ni same tutan mondon.

Kiam jam poste disiĝo nepra venos  
jus grandioza triumfo tiel rava,



por Esperanto tutplene fruktoĥava,  
nian progreson neniu jam detenos,  
la skeptikuloj eĉ ankaŭ nin komprenos.

### « CHINA » (1)

China estis bela la katino  
kiu ĉiam familion ravis ;  
kaj por kiu ni karesojn havis  
ĝis momento rabi ĝin Destino.

De l' katino perdis ni la ĉarmoĵojn,  
kaj pro ĝia morto, la doloro  
ĵus sumiĝis al la korangoro  
nia, fluigante niajn larmojn !

Tiel bela estis felo ĝia,  
kiel tiu de la leopardo ;  
kaj nek ĝiaj ungoj pro hazardo  
estis akraj por la haŭto nia.

Kiam ni, ha !, diris adiaŭon  
aŭ al la orelo ĝia : «China !»,  
delikata bleko la katina  
donis nin respondan la miaŭon.

Ho, ve ! Nia la katino kara !  
Nia milda kaj amata besto !  
Ĉiam por ni ĝia la foresto  
estas rememoro tre amara !

### « OFENDIDO » (2)

La kvarpiedulo mia nuna  
estas tre inteligenta bruto ;  
kvankam nerva, tute nobla ; juna,  
facilmova : bela ĝia tuto.

Tre mirinda estas de l' ĉevalo

---

(1) Elparolu *ĈINA*.

(2) Nomo de la ĉevalo, en hispana lingvo estas la pasiva participo de la verbo *ofendi*.

delikata ĝia dres' perfekta :  
ĝi ja paŝas takte, laŭ por balo,  
kvazaŭ por la danco belaspekta ;  
same trotas ; per galopo, lulas  
la rajdanton, kaj mirinde saltas ;  
en okuloj ĝiaj, vivo brulas ;  
per parolo sola, ĝi ja haltas.

Kredu min, ĉar tute mi ne fuŝas :  
obeeme ĝi al milda kanto,  
ĝi genufleksiĝas, eĉ ekkuŝas  
komprenante volon de l' dresanto.

### SENE SPERO

Staradas tre densaj nebuloj,  
ve !, antaŭ la miaj okuloj ;  
pupiloj malgajaj iliaj  
ne estas de longe jam viaj  
—filinoj amataj—speguloj.

Malĝojo ! De longe ne sidas  
ni unu apude aliaj...  
Feliĉon nenian mi vidas ;  
amataj filinoj graciaj,  
nenio min gaje jam ridas !

Dolĉegaj ravantaj paroloj,  
jes, estis agrablaj kortuŝoj,  
venante de viaj la-buŝoj ;  
pro viaj tutkoraj memvoloj,  
por mia la koro, konsoloj.

De longe regadas silento  
ĉe mia izolo dolora ;  
forflugis ja miaj kontento  
kaj rido sincere bonkora...  
Ne estas feliĉa momento !

Kaj akre mortiga malĝojo  
min ĉiam dolore katenas ;  
mi iras sur dorna la vojo...

La morto por mi, do, konvenas,  
ĉar vane trankvile mi penas...

Nu; mi jam forlasu la teron  
en kiu kruela la sorto  
faligis sur min la mizeron...  
Ne estas kapabla jam forto  
redoni al mi la esperon!

Mi havas, do, pravan motivon  
forlasi kruelan la vivon,  
kaj kiun nenio balzamas...

Min lasu, ĉu min ne malamas,  
rulanta sur tian deklivon,

ĝis kiam la Morto kompata,  
indulga, ameme min tiros  
al mondo eterdelikata  
en kiu spirito sopiros  
neniam je amo malsata!

### M I A O P I N I O

Per ĉi lasta la poemo  
staras mia l' opinio  
pri neologisma temo  
de l' japanrezolucio:

estas ĝi decido sana  
kontraŭ la neologismoj  
tiu de l' Kongres' Japana,  
kontraŭ tiuj barbarismoj;  
ne neologism' necesa  
por la versfarad' de verko,  
ne ĝin faros ja sukcesa  
tiu neutila sterko.

De la simpla lingvo-uzo  
jen rezulto: ĉi laboro  
spite de naiva muzo  
de humila amatoro;  
per la verko, per ĉi tiu

ja mi donas la ekzemplon :  
sur la Fundament' konsci  
nur starigi nian templon.

Esperanto estas sole  
vera lingvo de l' PRAKTIKO ;  
al ĉi tio, do, memvole  
metu sin BELETRISTIKO.



# ENHAVTABELO

	<i>Paĝo</i>
1. Antaŭdiroj .....	3
2. Kvazaŭ prologo. 3. Klarigoj. 4. Pri titoloj.....	6
5. Averta .....	7
6. Dediĉo .....	8
7. Pri mia plorata filino Amelio.....	10
8. Skiz-portreto de Marina.....	14
9. Hieraŭ .....	18
10. Hodiaŭ .....	20
11. Teruraj datoj.....	22
12. Caridad kaj Matilde.....	25
13. Songoj kaj sopiroj.....	26
14. Tagiĝo kaj espero.....	27
15. Por la tombeskribo nia.....	28
16. Je la morto de Th. Cart.....	29
17. Asturias .....	29
18. Al Hector Hodler.....	31
19. De tra fera krado.....	31
20. Profunda amo.....	34
21. Antaŭsento .....	34
22. Pri amo.....	35
23. Kavalira amo.....	36
24. Plendo kaj venĝo.....	38
25. Ĉiam espero.....	40
26. Al brunulino.....	41
27. Pri ondoj.....	42
28. Sopiroj de orfo.....	47
29. Al mia naskiĝlando.....	49
30. Ha, Sevilo!.....	53
31. Kanto al Hispanujo.....	59
32. Kanto al Valencio.....	70
33. Kio ŝi al mi?.....	76
34. La Majstro.....	77
35. Ĉe la tombo de la Majstro.....	85
36. Ĉe la hejmo de la Majstro.....	85
37. Ĉe Bialystok.....	87
38. Pri miaj bestoj.....	89
39. Obstino kaj fido.....	95
40. Ve, milito.....	97
41. Respondu .....	98
42. Kial ŝi ruĝiĝis?.....	99

43.	Ĉe la aragona Pireneo.....	1100
44.	Je ŝia nomfesto.....	1101
45.	Amperfido .....	103
46.	Sola jeso bela.....	1104
47.	Kanto de amanto.....	107
48.	Alvoko .....	1108
49.	Jen sorto mizera.....	109
50.	Espero .....	111
51.	Kontraŭaĵoj .....	1112
52.	Kialo pri prefero.....	114
53.	Ne timu.....	116
54.	Nokta deĵoro.....	117
55.	Al Vieno tra l' Danubo.....	119
56.	De Vieno.....	119
57.	Al la dekkvina.....	120
58.	Al Trinidad Soriano.....	121
59.	Memoraĵo .....	122
60.	Kvazaŭ preĝo.....	123
61.	Al Rafael de San Millán.....	124
62.	Al Christensen.....	125
63.	Kiam mi rajdas.....	125
64.	Vintro .....	127
65.	Spite de ĉio.....	130
66.	Ĉe malliberejo.....	131
67.	Al finlandanino.....	140
68.	Ĉiam kanto al amo.....	140
69.	Ne timu.....	141
70.	Je la vespera krepusko.....	142
71.	Konstato .....	143
72.	Ho, Mari' ! Ho, Mari' !.....	143
73.	Antaŭen ! (Himno).....	145
74.	Esperanta marŝo.....	146
75.	Kora plendado.....	147
76.	Al Zaragoza mitingo.....	153
77.	Himno al Asturias.....	154
78.	Ukrania kanto.....	155
79.	Turka kanto.....	155
80.	Pluvas, paŝtisto !.....	156
81.	La foto de Valencio.....	158
82.	«Nova Sento» (Marŝo).....	159
83.	La barkotrenistoj de l' Volga.....	160
84.	Al samideanoj.....	162
85.	«China» .....	163
86.	«Ofendito» .....	163
87.	Senespero .....	164
88.	Mia opinio.....	165





**PREZO de ĉi tiu verko:**

<i>Por membroj de Hispana Esperanto-Asocio...</i>	<i>2 pt.</i>
<i>Por ceteraj hispanaj samideanoj, ĉiel por la</i> <i>hispan-amerikanaj .....</i>	<i>4 pt.</i>
<i>Por ĉiuj ceteraj samideanoj.....</i>	<i>3 so. fr.</i>

*El la du lastaj prezoj oni elkalkulos grandan rabaton, ĉiam oni mendu po grande, eĉ duonon el la prezo ĉiam oni mendu almenaŭ 25 ekzemplerojn.*

**ANTAŬPAGO ESTAS NEPRA!**